VIa jaro. — No 78

Unu numero : 6 SPESDEKOJ (15 centimoj)

20 Majo 1910

ESPERANTO

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

KAJ DE INTERNACIA INSTITUTO DE ESPERANTO

Duonmonata Internacia Gazeto

Direktoro : HECTOR HODLER

ABONO

Jara Abono. . . . . 1,60 $ (4 frankoj)

La abonoj komenciĝas de la 1a de ĉiu monato. Oni akceptas nur unujarajn abonojn. Oni abonas ĉe la Administrejo, Esperanto-Oficejoj kaj lokaj Agentoj.

Redaktejo & Administrejo : *10, rue de la Bourse,* **GENÈVE (Svisujo).**

REKLAMO

Ĝeneralaj Agentoj : Esperanto, 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo). G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris ;* C.-A.-G. Browne, 20, Wellington St., Strand, *London W.-C. ;* Germana Esp. Librejo, Rathausstr, 52, *Leipzig* Bigalke kaj Mohwinkel, Schleinitzstr. 6, *Bromberg,* Berger, c/o Spineux, 3, rue du Bois-Sauvage, *Bruxelles.* — Vidu la tarifon sur la 3a paĝo.

Dum la lasta duonmonato

En Bruselo, ĉe la Mondkongreso de la Internaciaj Asocioj estis pluraj reprezentantoj de la Esperantistaj organizajoj. La Revuo de la Kongresoj publikigas regulan Esperantan resumon. Sro Hodler, reprezentanto de U. E. A., faris paroladon, kies ekstraktojn oni povos legi ĉi-sube.

La programo de la kongreso en Augsburg kaj la kondiĉoj de loĝado estas nun definitive fiksitaj. Ĉiuj Esperantianoj rapide do sendu sian aliĝilon (vidu sur la 4a paĝo).

Okazis sukcesa Esperantista belga Kongreso en Bruges.

La preparoj de la Washingtona Kongreso bone progresas. En nia proksima No oni trovos la programon de la Kongreso kaj detalojn pri la vojaĝo.

La Socia Signifo de U. E. A.

Ni publikigas ĉi tie la unuan parton de la raporto pri U. E. A., farita de S-ro. H. Hodler, ĉe la *Tutmonda Kongreso de la Internaciaj Asocioj* en Bruselo. La dua parto rilatas al la organizo kaj servoj de U. E. A. ; ni ne publikigos ĝin ĉie tie.

Ni de la komenco deziras forigi ĉian malkompreniĝon, kiun povus naski la vorto Esperanto en la titolo de la Asocio, reprezentata de ni : Universala Esperanto-Asocio neniel celas propagandi la lingvon Esperanto ; ĝi ne okupiĝas pri la problemo de lingvo internacia. Ĝi nur estas internacia organizajo, kiu uzas la lingvon Esperanto por siaj internaj rilatoj tute same kiel nacia societo uzas la nacian lingvon de la lando en kiu ĝi estas.

La vorto Esperanto estas en la titolo de nia Asocio ĉar ĝi unuflanke rememorigas la nomon de l'ilo la plej necesega por la funkciado de nia organizajo, aliflanke ĉar la vorto Esperanto estas intime ligita kun la movado nomita Esperantismo, kies principojn fiksis D-ro. Zamenhof (kiu, kiel sciate, subskribis sian unuan verkon per la pseŭdonimo Esperanto) — principoj por kies realigo laboradas U. E. A.

Dirinte ĉi tion por klare montri, ke nia Asocio ne estas esperantista en la ordinara senco de tiu vorto, ni vidu, kion ĝi celas, kiel ĝi komprenas la internaciismon.

U. E. A., kiel fiksas ĝia statuto, celas plifaciligi la materialajn kaj moralajn rilatojn inter homoj de malsamaj lingvoj, nacioj, rasoj, kaj krei inter ili potencan ligilon de solidareco.

Por atingi tiun ĉi celon ĝi klopodas krei diversajn praktikajn *servojn*, kiujn de nun povas uzi ĉiuj personoj, institucioj, organizajoj, kiuj partoprenas en la vivo internacia.

En Kongreso de la Internaciaj Asocioj estas ja neutile montri ĝis kia grado plialtiĝis la rilatoj inter individuoj kaj institucioj de malsamaj nacioj, kiel super la naciaj lingvoj aŭ rasaj baroj, kreiĝas sento de solidareco ĉiutage pli profunda. Oni tamen ja ne devas nuntempe trograndigi la gravecon de tiu tendenco al internaciismo kaj tro esperi al ĝi. Kiel ĝi estas nun komprenata de la plimulto de tiuj homoj, kiuj sin diras ĝiaj partianoj, la internaciismo, kiel ankaŭ la pacifismo, celas nur plifaciligi la rilatojn inter la *nacioj* aŭ naciaj institucioj ; ĝi nenion kreas *super* ili.

En sia verko pri la « Internacia Organizo de la Internaciaj Asocioj ». S-ro. P. Otlet skribas : « Venis nun la momento transiri nun el la negativa fazo de l'internaciismo, karakterizata per la paciga movado, al la fazo pozitiva karakterizota per tutmondaj entreprenoj. La forigo de la milito ne pli sufiĉas por organizi la vivon internacian ol la forigo de la revolucioj sufiĉis por organizi la civilizecon kaj prosperecon de regno. » Alivorte, por ke ekzistu vivo internacia, estas necesega, ke ekzistu internaciaj institucioj. Restas la demando, ĉu tio estas ebla sur la fundamento de la nuna internaciismo.

Malgraŭ la nekontesteblaj progresoj de l'internaciismo dum la lasta jarcento, ni daŭras pensi *nacie*, juĝi ĉiun verkon laŭ nia pure nacia kriterio, ni daŭras konsideri la nacion kiel la plej altan gradon de l'socia organizo kaj ĉion dependigi de ĝi.

Vidu do tiel nomatan internacian kongreson, ĉu de sciencistoj, ĉu de aferistoj, ĉu de laboristoj. Angloj, Francoj, Germanoj, Italoj, Rusoj kunestas ; oni ellaboras komplikajn regularojn por starigi perfektan egalecon de rajtoj inter la reprezentantoj de la diversaj nacioj, kvankam oni ja ne ĉiam sukcesas ; oni ornamas la kunvenejojn per standardoj de la reprezentitaj nacioj, zorgante pri ĉies ofendemiĝemeco, pri ĉiuj memestimoj ; oni penas forigi el la diskutoj ĉiujn temojn, kontraŭajn al la reguloj de internacia ĝentileco, kiu, pro manko de alia pli fortika neŭtrala fundamento, ebligas, ke la kongresoj okazas kun ne tromultaj malfacilajoj. Povas partopreni en la debatoj nur tiuj homoj, kiuj havas la privilegion koni plurajn lingvojn ; post ĉiu kunveno, Angloj, Francoj, Germanoj, Italoj, Rusoj, aparte reiras al siaj respektivaj hoteloj ; vi ne sentas inter kongresanoj de malsamaj landoj tiun saman senĝenecon, tiun konfidon, tiun idekomunecon, kiuj regas inter samlandaj kongresanoj. Inter la unuaj ĉio estas malsama : lingvo, organizo, tradicio, priokupoj. Ili antaŭ ĉio estas Angloj, Francoj, Germanoj. Inter la duaj, kontraŭe, plena egaleco pri origino. Ili estas landanoj antaŭ ol esti anoj de tia aŭ alia urbo aŭ provinco. Io komplete organizita ekzistas super la urbo aŭ la provinco : la nacio, sed kio nun ekzistas super la nacio ? — Kunmetado de diversnaciaj homoj, sen forta interligilo, jen la nunaj internaciaj kongresoj. La internaciismo, kiel ĝi estas hodiaŭ komprenata, povas nenion pli.

Ĉu vi permesos, ke al tiu tipo de internaciaj kongresoj mi prezentu al vi kongreson Esperantistan. Vi per tio konscios pri la diferenco, kiu ekzistas inter la internaciismo kaj la Esperantismo, kiel ĝin konsideras nia Asocio.

Angloj, Francoj, Germanoj, k. a. kunestas, sed tio ne estas ilia ĉefa titolo ; tuj kiam ili partoprenas en la kongreso, ili ĉesis esti Angloj, Francoj, Germanoj, kaj refariĝis *homoj*. Unika standardo, kiu simbolas ilian komunan idealon, ornamas iliajn kunvenejojn ; la verda standardo de l'Esperantismo.

Unika lingvo estas parolata de la ĉiunaciaj partoprenantoj ; Esperanto. Inter ĉiuj kongresanoj plena egaleco, kiu rezultas ne el rompebla ekvilibrigo de la naciaj apetitoj kaj memestimoj aŭ el simpla ĝentileco, sed el tio, ke ĉiuj interrilatas sur neŭtrala fundamento, ke la partoprenantoj havas la impreson, ke ili ne apartenas al diversaj nacioj, sed ke ili ja komunikas unu kun la alia kvazaŭ ili estus el sama popolo. Kaj ĉu ili fakte ne formas popolon, ĉar ili ja uzas saman lingvon, saman monsistemon, ĉar malgraŭ la diverseco de la politikaj aŭ religiaj opinioj, de sia socia situacio, de sia nacieco, ili klare sentas, ke inter ili estas komuna idealo, al kiu ĉiuj povas iri ne forlasante sian patran lingvon, nek sian naciecon kaj ĝiajn tradiciojn.

Dum la internaciismo kunigas *nacianojn* kaj penas faciligi iliajn interrilatojn, sin apogante antaŭ ĉio sur la *nacioj*, konsiderante la naciojn kiel la ĉefajn organojn de ĉia internacia organizo, la Esperantismo kunigas *homojn :* ĝi ignoras naciecon, lingvon kaj rason. Ĝi sin turnas ne al la nacioj, sed al la homoj kiuj deziras interrilati unu kun la alia. Liveri al tiuj homoj neŭtralan organizajon dank'al kiu ili povos plimultigi siajn interrilatojn, sin reciproke alservadi, kunigi sian penadon por komuna agado, ĉiam pli kaj pli internaciiĝi ; kreskigi inter ili ĉiam pli profundan senton de solidareco ; instrui ilin tiel ke ili juĝu ne laŭ pure nacia vidpunkto, sed laŭ neŭtrale homa, eksternacia kriterio ; fine edukadi la popolamasojn, ne per propagando, sed per kreado de materialaj, palpeblaj servoj, tiel ke la plej humila homo, kun la tempo, konsciu pri la grava instruo de internaciismo, kiu elŝprucas el tio, jen la tasko de Universala Esperanto-Asocio.

H. HODLER.

Oni rapide sendi sian aliĝon por la Kongreso de Augsburgo.

SOCIA VIVO

KOMERCO

La stenografisto kiel sekretario

Kiam iu ajn societo estas okupata nove elekti sian komitaton kaj oni scias de unu ĉeestanta membro ke estas stenografisto, tiam oni povas kun plena certeco antaŭdiri ke al tiu estos prezentita la ofico de sekretario.

Tio estas iom rajtigata, ĉar por bona raporto estas ne indiferenta, ĉu la verkisto kun malgranda peno, dum la kunveno faras siajn notojn kaj tiamaniere kun preskaŭ ne malgrandigata atento, ĉion kio en la halo okazas, observas, aŭ ĉu al li, pro la grandega vasteco de l'ordinara skribo io grava mankas.

Sed ke la scio de la stenografio ne estas necesa eco por sekretario, sekvas el la cirkonstanco, ke verkiĝis raportoj antaŭ ol la stenografio ĝenerale disvolviĝis, ke ankoraŭ hodiaŭ sennombraj bonaj raportoj verkiĝas de nestenografistoj kaj plie ke ne ĉiuj sur bazo de stenografiaj notajoj faritaj raportoj jam pro tio estas bonaj raportoj. Por bona raportisto estas granda nombro de specialaj ecoj necesaj kiuj sole kun la lernado de stenografio ne gajniĝas.

Formo kaj enhavo de raporto tre diferencas laŭ la proporcio Plej malgranda okazo por lia formpovo restas al sekretario ĉe la « malgranda » raporto. Tamen jam en tiu malvasta notado de la konkludoj, li povas montri la arton ligi kun mallongeco klarecon kaj plenecon. Jam pli libera li estas ĉe la « detala » raporto. Lia juĝo, ĉu io esenca aŭ neesenca estas, ludas gravan rolon, kaj la decido forte povas esti sub subjektivaj impresoj.

Ĉu la raporto enhavos la diversajn notojn en direkta aŭ nedirekta parolo, devas esti konsiderata de kazo en kazo. Ĉe tio devas kunagi la lingva gusto kiel ankaŭ la signifo de la individua parolo de l'parolanto kaj lia lerteco en esprimo.

Kiu en frazkonstruo, en la vortfarado malbone parolas, ties vortojn enskribos la raportisto ne en direkta parolo en la raporto, sed en transformitan novan pli facile kompreneblan kaj antaŭ ĉio en pli malvastan formon. Dum kontraŭe al la bona parolanto lia esprimmaniero estos lasata kaj devas esti lasata, se la vortoj ne estas ripeto de jam aŭskultita. En tiu kazo mallongeco estas la unua postulo.

Oni povas diri ke la speco de l'raporto, la grado de pleneco kun ĉiu nova sekretario ŝanĝas. Eĉ la sama sekretario povas en la sama oficperiodo, verki la raportojn de la komitatkunsidoj kaj tiujn de la societkunvenoj laŭ tute malsama maniero, ke sole el la formo oni ne povus konkludi al la sama verkisto. Estas ofte rimarkebla, kiel la malnovaj societanoj, kiam ili aŭskultas la unuan raporton de la nove elektita sekretario aŭ kontente sin alrigardas aŭ kiel laŭ la cirkonstancoj preskaŭ sufoka silento super la kunvenantaro etendiĝas, ĉar jam tiu unua produkto montris klare ke la elekto estis eraro.

Kiam la societveteranoj rajtas tian rapidan juĝon, tiam la raporto devas esti afero en kiu la povo de la sekretario trovas lertan esprimon. Sed el tio oni tute ne devas konkludi ke la raportisto tiom kiel eble aldonu de si mem. Tio ĉi malofte taŭgas, li devas esti tute neŭtrala. La raporto devas antaŭ ĉio esti objektiva. Tion forgesas multe da raportistoj rekte tiam, kiam ili ĝin devus plej malmulte forgesi, nome kiam en la kunveno formiĝas du partioj, kaj ili mem treege partoprenas. Ke la raportisto en la diskuto partoprenas estas nature ne malpermesebla, sed li tiam devas en la raporto pritrakti la paroladojn de ambaŭ partioj egale. Kiam li en tieaj okazoj laŭvorte notas la paroladojn, li agos plej bone kaj povos bone redoni la opinion de unu alia, kiu rekte konstraŭstaras al lia propra.

Mallongeco estas grandega prefero de raporto. Sed estas trograndiĝo de tiu devizo, kiam la raporto en kelkaj malmultaj vortoj redonas la opinion de la raportinto, aŭ pri diskutado mallonge diras, ke estus troa ripeti ĉiujn vortojn. Estas necesa ke la sekretario notu en sia raporto la esencon de ĉiu valorplena parolo, kaj tamen tiel mallonge kiel eble. Se sekvas priparolado, tiam devas la stenografanta sekretario denove montri sian arton, ke li de sia propra opinio pri la afero sin tute fortenas, sed al ĉiuj en la diskuto elparolitaj pensoj kun amo sekvas kaj ilin tiel reproduktas, ke la apartaj parolantoj ne povus vestigi, kion ili volis diri plej bone en malmultaj vortoj.

Se prosperas al la raportisto tiun fidelecon de la enhavo de la priparolado kunligi al la plej granda fideleco de la parolmaniero karakteriza por ĉiu aparta parolanto kaj samtempe al mallongeco, tiam li povas diri ke li bone plenumis sian taskon. Sole tiam li rajtigas siaflanke la konsideron ke la stenografisto estus la « naskita » sekretario. Ĉar en la fidela reproduktado de la karakterizaj formoj de ĉiuj pensoj, la nestenografanta sekretario neniam povas konkuri kun la stenografisto.

Trad. F. Sch. (Basel).

Por la kvarspesdeka poŝta tarifo

Influa deputataro antaŭ ne longe interviuvis la Poŝtan Ministron de Anglujo por diskuti la eblecon kaj dezireblecon de la kvarspesdeka poŝto inter Francujo kaj Granda Britujo. S-ro Henriker Heaton, la entuziasma klopodanto de poŝta reformo, kiun nenio malpli ol la kvarspesdeka poŝta interŝanĝo al Marso kontentigus, partoprenis en la diskutado. La komisiato de la deputataro forte atentigis al la diferencego postadi leteron ĝis Nov-Zelando (11.000 mejlojn) po kvar spesdekoj dum la transportada kosto de Dovro al Kaleso (nur 20 mejlojn) estas dek spesdekoj. Kvankam Francujo favore konsideras tiun-ĉi projekton la poŝta Ministro respondante klarigis ke malgraŭ nia pli ol koraj interrilatoj al Francujo, niaj interrilatoj al Germanujo egalas kaj nia komerca interŝanĝo superas tiun interŝanĝatan kun Francujo ; tamen nur financaj motivon influis lian bedaŭrindan rifuzon. Estas kalkulate ke la unua jara malgajno estus 900.000 $.

Kvankam tiu-ĉi malprofito pro la plimalkostigo de komunikado rapide malgrandiĝus, la Ministro pro la nuna embarasita stato de la nacia financo devige konsilis ke la deputataro atendu pli kontentigan financan tempon.

T. K. H. (Pontefract).

◆

EKSPOZICIOJ

La Esperanta ekspozicio en Budapest

La 7-12 an de Aprilo okazis en Budapest la unua esperanta ekspozicio en Budapest, dum la kvina « ĉiujara printempa foiro ».

La direktantaro de l'foiro donis al la aranĝintoj la eblon ekspozi ĉian esperantajn dokumentojn, rilatajn al komerco.

La ekspozicion aranĝis nia Budapeŝta konsulo Ferdinando Varga, kiu prenis sur sin la taskon ĉeesti la ekspozicion, kaj doni informojn pri Esperanto al la interesiĝintaj komercistoj, en kaj fremdlandaj.

La posedanto de l'Budapesta Esperanto oficejo S-ro. Ludoviko Kokai helpis la aranĝinton S-ron Varga, kaj ekspozis esperantajn librojn, grandan nombron da hungaraj gramatikoj kaj vortaroj kaj multegon da ĉefeĉaj ŝlosiloj hungaraj.

La interesiĝo inter la hungara komercistaro estis tiel granda, ke oni apenaŭ povis donadi la necesajn informojn, montradi dokumentojn k. t. p.

Jam ĉe la malferma festeno, la komerca ministro vizitis la esperantan parton de l'ekspozicio, kaj informiĝis pri Esperanto, demandinte : « Ĉu la esperanta movado en Hungarujo progresas ? »

La hungara gazetaro, ankaŭ publikigis bonajn opiniojn pri la esperanta ekspozicio kaj atentigis la publikon viziti nian propagandan ekspozicion.

Por la interesiĝintaj komercistoj k. t. p. oni vendis 850 ĉefeĉajn ŝlosilojn, multon da pli grandaj gramatikoj, vortarojn k. t. p.

La propaganda ekspozicio multe akcelis nian komunan aferon en Hungarujo.

Ferd. Varga,
(Konsulo Budapest).

◆

ARTO

Ankoraŭ pri vaksa busto de Leonardo de Vinci.

En la n. 76 de « Esperanto » S-ro Rosenstock (Krakovo) asertas, ke post la zorgaj kaj nun finitaj ekzamenoj laŭ ĥemia vidpunkto la vereco de la famkonata busto estis neata : ne Leonardo da Vinci kreis ĝin, same ne iu el liaj skolanoj ; ĉar la uzita materialo ankoraŭ ne ekzistis tiam en la komerco. Jes ! hodiaŭ mi tute konsentas. Kiam mi skribis la artikolon aperintan en la N. 74 de « Esperanto », tiam la disputo pri vereco de la busto ankoraŭ ne decidiĝis laŭ mia opinio, kvankam jam tiam duboj pri vereco ekzistis, ankaŭ ĉe mi. Kiam mi legis artikolojn de D-ro Pinkus kaj de aliaj kompetentuloj, mi ekvolis kolekti ĉiun materialon por klarigi la aferon por plua artikolo en « Esperanto » ; ĉi tion nun plenumis S-ro Rosenstock. — Do, pri la vereco mi ŝanĝis mian opinion, sed ne pri la beleco de la busto. Kelkfoje kaj longtempe mi mi rigardis la artajon : jes — jen artajo, nu mi devas aldoni : laŭ mia persona gusto ; kaj « pri gustoj oni ne diskutu ».

Arnold Behrendt (Berlin).

◆

AERVETURADO

Aviada semajno en Nice

De la 15 ĝis la 24 aprilo okazis en Nice grava aviada konkurso dum kiu estis disdonitaj 86.000 Sm. kiel premioj. La konkurso tre bone sukcesis, kaj oni certigas ke escepte en Reims, nenie oni vidis tiom da aviadistoj en la aero.

Partoprenis en la konkurso Latham (franco) monoplano « Antoinette » ; Efimoff (ruso) biplano Farman ; Van den Born (Belgo) biplano Farman ; Duray (Belgo) biplano Farman ; Rougier (franca) biplano Voisin ; Grade (Germano) monoplano Grade ; Metrot (franco) biplano Voisin ; Swendsen (dano) biplano Voisin ; Chavez (peruano) biplano Farman ; de Riemsdyck (holandano) biplano Curtiss ; Olieslagers (Belgo) monoplano Bleriot ; Rolls (anglo) biplano Wripht ; Rawlinson (anglo) biplano Farman.

La aviadejo estis aranĝita apud maro je 6 km. de Nice. La vetero tre favoris la konkurson. Nur sur la lazura marbordo oni povas vidi tian mirindan vidajon, kian oni vidis en Nice : Brilega suno, kvieta bluakolora maro, malproksime la altaj neĝaj montoj, kaj en la aero, super la kapoj de la ĉeestantoj grandegaj bruegaj birdoj flugantaj alte kaj malalte, super kamparo kaj super maro iafoje tiel proksime ke la ĉapeloj florflugis, aliafoje tiel malproksime ke oni ne plu vidis ilin.

Ofte oni vidis kvin aviadilojn samtempe en la aero.

Ĉiutage, estis disdonita premio al la aviadisto kiu plej rapide ĉirkaŭflugis la aviadejon. Tiu premio estis gajnita kvinfoje de Efimoff trifoje de Latham. La plej rapida ĉirkaŭflugado estis farita de Latham (6 km. dum 5' 41").

Ankaŭ ĉiutage estis disdonita premio da Sm. 200 al la aviadisto kiu forflugis de la tero la plej proksime de la komenca ekforiro. Tiu premio estis, ĉiutage, gajnita de Efimoff. Kelkafoje, li bezonis nur 10 metrojn por forflugi.

Premion da Sm. 800 gajnis Van den Born kiu flugadis kun pasaĝero dum 1 h. 10 m. 22 s. traflugante 62 kilometroj 708 metroj.

La 21an de aprilo premion de alteco Sm. 4.000 gajnis Latham. Li flugis ĝis 656 metroj alte super la maro ; Chavez gajnis la duan premion (Sm. 2.000) flugante ĝis 644 metroj.

La vetero ne estis tre bela kiam oni konkursis por la plej granda distanco traflugota dum nur unu flugado. Efimoff gajnis la premion (Sm. 5.000) flugante 81 km. 216 m.

Efimoff gajnis ankaŭ la premion da Sm. 12.000 por la sumigo de la distancoj. Dum la konkurso li flugadis la distancon da 980 kilometroj.

Sed pli interesaj al la aliaj estis la du lastaj tagoj. Sabato 23an okazis grava aera krozado super maro. Ekforirinte de la aviadejo, la aviadistoj iris ĝis Kap-Ferrat kaj returnis aviadejon, flugante 24 km., super maro, malproksime de la marbordo. Sep aviadistoj plenumis la krozadon Latham gajnis la unuan premion (Sm. 8.000) fluginte la krozadon dum 16 m. 47 s. Rolls gajnis la duan premion, Duray la trian.

La morgaŭan tagon okazis alia krozado Nice-Antibes-Nice, 28 kilometroj, ses aviadistoj sukcesir tiaflugi la distancon ; Latham gajnis ankoraŭ la unuan premion (Sm. 8.000). Dum tiu krozado Van den Born kiu tre deziras montri ke li estas unu el la plej bonaj inter la plej bonaj aviadistoj ekforiras de la aviadejo, kaj ne havante la moralan subtenon de la vaporŝipoj, sin direktas al Monako, turnas ĉirkaŭ la Oceanografia Muzeo kaj revenas aviadejon, fluginte 36 minutoj super maro.

Kompreneble okazis kelkaj malfeliĉajoj. La plej bedaŭrinda estas tiu, kiun suferis Rougier. Flugante je 50 metroj super la maro Rougier ricevis baton de la vento kaj li falis en maron. Feliĉe oni povis savi lin sed lia aviadilo estis disrompita kaj li ne plu povis partopreni je la konkurso. Grade ankaŭ falis en la riveron Varo ; li ricevis nenian vundon, sed lia aviadilo estis difektita.

Ne necese estas diri ke multe da personoj ĉeestis ĉe la aviada konkurso. Ĉiutage la aviadejo estis invadita de la popolo kaj multajn aplaŭdojn ricevis la aviadistoj. Inter la ĉeestantoj ni nomos la reĝon de Svedujo kaj ankaŭ la reĝon de Danujo.

Kaj nun, ĝis la venonta jaro.

J. M. (Del. Nice).

HEJMA BIBLIOTEKO [illegible]

IDEOJ & FAKTOJ

La demando pri negroj en Usono.

Unu el la plej gravegaj socialaj demandoj en Usono hodiaŭ estas tiu, kiu rilatas la negran loĝantaron. De multaj seriozaj pensistoj estas akceptate, ke la tiel nomata « negra problemo » estas la superega demando de la amerika nacio nuntempe. Seriozega kiel ĝi estas en sia estanta stato, ĝi minacas la estontan prosperon de la nacio en tia grado ke oni ne povas konjekti kiom da aŭ kiaj malbonaĵoj eble devenos de la ĉeestado de raso kiu ĉiam restos aparta popolo, kiu neniam asimiliĝos kun la blanka raso, kaj kiu je surprizegiga rapideco ĉiam estas pligrandnombriĝanta. Aliaj gravaj decidotaĵoj ekaperas, postulas solvadon kaj solviĝas industriaj demandoj, komercaj problemoj, juĝaj postuloj pri la rajtoj de la regnanoj, pri la malriĉegeco, pri la tarifo, pri la popolenmigrado, pri la infanlaboro, pri tio ĉi kaj tio sed jen problemo kiu restas nealiigita, ŝajne nealiigebla; ne solvita, ŝajne nesolvebla.

La lasta recenzio farita en Usono en la jaro 1900 elmontris ke estis preskaŭ 9.000.000 negroj en la respubliko. Dum la dekjaro kiu finis tiun jaron la procento de la plimultiĝo de tiu popolo estis 18. 1. Allasante la saman procentan plimultiĝon por la dekjaro 1900-1910, oni povas kalkuli ke la nombro de la negroj en Usono hodiaŭ estas proksisumume 11.000.000, dekono de la loĝantaro. Rilate al la distribuo de tiu ĉi grandega loĝantaro troviĝas ke 9/10 de la tuto estas en tiu parto de Usono kiun oni nomas « La Sudo », kiu kuŝas sude de la Rivero Ohio kaj laŭlonge de la valo de la Riverego Misisipo. En iuj el la sudaj Ŝtatoj Misisipo, Sudkarolino, Luizano, k. a.-pli ol duono de la loĝantaro estas nigra. Oni nomas tiun sekcion « la nigra zono », kaj kondiĉoj tie rilate al la neobservado de leĝoj, la senmoraleco, la neinstruiteco kaj la ĝenerala nescieco estas terurigaj. Ofte la fetiĉismon tie oni praktikas kaj la vivkutimoj ne multe malsimilas tiujn de la sovaĝaj gentoj en centra Afriko, de kie fakte la prapatroj de la usonaj negroj devenis antaŭ ne multe da generacioj.

Laŭvole la nigruloj preferas la urbojn ol la kamparon kaj ili kolektiĝas tien grandnombre ne nur al sia propra malbono sed ankaŭ al la malbono de la urboj. Estas trideko da urboj en Usono, kiuj havas pli ol 10.000 nigrulojn. Pro tio ke tiuj ĉi homoj ne povas okupi sin je la dezirindaj laborprofesioj, sed devas elserĉi la plej malaltajn kaj malprofitajn taskojn, sekvas ke ĉiam estas tre multe da senokupuloj en ĉiuj urboj kiuj ne povas eltrovi laboron, kiuj tagon post tago mallaboras ĉirkaŭ la stacidomoj kaj publikaj konstruaĵoj aŭ sencele vagadas tra la stratoj. Oni miras kiamaniere ili povas vivi, kie ili obtenas la necesan nutraĵon, ĉar la registaro ne permesas la publikan almozpetadon. Ekster kontraŭdiro la ĉeestado de tia popolo ĉu blanka ĉu nigra malakcelas la prosperon de iu urbo, malgrandigas ĝian karakteron, plimultigas la kriminalecon, kaj ĉiamaniere difektas ĝin. Inklini tiujn homojn ke ili forlasu la urbojn kaj iru al la kamparo kie ankoraŭ sufiĉege da malkara tero restas, plibonigi iliajn kondiĉojn kaj samtempe la kondiĉojn en la urboj mem per la enkondukado de la senokupuloj de la urboj en tiujn laborrangojn por kiuj ili estas taŭgaj, jen celoj de la urbaj kaj ŝtataj registaroj.

La statistikoj laste faritaj de la registaro nacia elmontras ke preskaŭ duono de la nigra raso en Usono ne povas legi aŭ skribi. Ĉar la legado kaj la skribado estas nuraj simplaĵoj kaj efektive signifas tre malmulte rilate al reala edukiteco, estas verŝajne ke tri kvaronoj de la nigruloj estas en malklera needukita stato. Oni ne devus kulpigi la registaron pro tiu malfeliĉa fakto: la popollernejoj estas senpagaj por la nigruloj same kiel por la blankuloj kvankam ofte sin trovas apartaj lernejoj por la nigruloj sed ekzistas inter tiuj ĉi homoj tia neinklineco kaj nekapableco antaŭeniri en la edukaj aferoj ke rigardante tiun fazon de la negra problemo oni nur povas malesperi. Tamen devus esti dirate ke ia progresado fariĝas kaj estas esperote ke la baldaŭ aperontaj statistikoj elmontros plimulte plibonigitajn klopodojn flanke de la nigruloj pri edukiĝo. Troviĝas kelke da tre admirindaj altlernejoj kaj teknikaj kolegioj por nigruloj, ambaŭ en la Nordo kaj en la Sudo, kaj speciale notinda estas la provoj kaj laboro de Booker T. Washington, la plej eminenta negro en Usono, kiu ĉe Tuskeĝi, Alabamo, starigis kaj sukcesigis la famkonatan Tuskeĝi'n Instituton por la instruado de junuloj. Multe oni povus priskribi pri tiu ĉi noblulo, tiu ĉi altpensulo kiu elvenis el la mallumeco kaj la mizereco de la sklaveco, kaj kiu per siaj propraj nehelpitaj provoj, siaj fortegaj kaj nelacigeblaj penadoj suprenrampis al tiu altpinto kie li hodiaŭ staras, la kondukanto, la plej antaŭa viro de sia popolo.

Je malmulte da esceptoj la negroj estas malriĉaj, plej ofte malriĉegaj. Ili estas senantaŭzorga popolo, havante neniun penson pri la morgaŭo, kion ili manĝos aŭ kiel ili vestiĝos. En la Sudo la plimulto da ili estas farmuloj, ne farmposedantoj, sed nur farmluantoj aŭ farmlaboristoj. Iliaj metodoj por la kulturado de la tero estas la plej malbonaj kaj malperfektaj; la rezultatoj estas la plej malbonaj kaj malperfektaj; la rezultatoj estas samproporciaj. El fruktodona tero kiu, se oni ĝin kultugus laŭ saĝaj metodoj, riĉigus la farmulojn, ili nur povas elpreni necesbezonan kaj ĝemindan ekzistadon. Tamen ili ne plendas; ja estus pli bone se ili iome malkontentiĝus ĉar la malkontenteco estas la unua paŝo al pli bonaj statoj. En la Nordo tre malmultaj negroj estas farmuloj. Anstataŭe, ili amasiĝas en la urboj kaj urbetoj kie ili okupas sin en malaltaj oficoj; ili estas servistoj, ĉevalistoj, veturigistoj, laboristoj, k. t. p. Malmulte da ili estas metiistoj, pli malmulte komizoj aŭ kalkulistoj, aŭ do tenas iajn oficojn en kiuj la edukiteco estas postulata. Sed estas fakto notinda ke la norda nigrulo estas pli lerta, pli progresema, pli ambicia, malpli mallaborema ol sia suda frato, kaj tial ĉiamaniere pli dezirinda societano.

La rasa antipatio kiu ekzistas inter la blankuloj kaj la nigruloj ĉie videbliĝas. Ĉie la blankuloj evitas la nigrulojn, kaj en kelkaj ŝtatoj rifuzas al ili la privilegiojn kaj prerogativojn kiuj rajte apartenas al ili. La nacia konstitutio permesas al la nigruloj rajtojn kaj privilegiojn egalajn je la blankuloj; laŭ ĝi ili povas voĉdoni kaj partopreni en la regado de la lando, sed fakte ili tre malmulte ĝuas tiajn rajtojn. Speciale tio estas vera en la Sudo. Tie la ŝtataj konstitucioj ruze evitas la postulojn de la nacia konstitucio kaj senigas la nigrulojn je la voĉdonrajto. Ankaŭ troviĝas en la sudaj ŝtatoj leĝoj kiuj malebligas ke la nigruloj veturu aŭ vojaĝu kune kun la blankuloj: estas necese ke ili havu apartajn vagonojn kaj tramojn, ke ili elektu la malsupran ferdekon de ŝipo, k. t. p. Hotelestro en la sudlando ne gastigas nigrulon; troviĝas por ili apartaj lernejoj, preĝejoj, loĝejoj, k. t. p. Fakte la nigrulo estas societa elpelito kaj oni ne povas konjekti kiam li ne estos tia. Pro tiaj bedaŭrindaj kondiĉoj sekvas ke akrega antagonismo kaj malamego staras inter la du popoloj, antagonismo kiu sin malkaŝigas, flanke de la negroj, per la ŝtelado, la dombruligado, kaj, plej terure, la virinrabado; flanke de la blankuloj, per la linĉado, la vipado, kaj eĉ la mortigado per la fajro.

La vera seriozeco de la negra problemo kuŝas en la fakto ke troviĝas en la respubliko 11.000.000 homoj de ekstera, malsupera kaj tute neasimilebla raso. Jen du malsamaj popoloj; unu malamas la alian; la natura antipatio kiu ĉiam estas inter ili nuligus ian interedzecan proponon, kaj la plenumado de tia propono nur pligravigus la demandon, ĉar la idaro de unuiĝo de blankulo kaj nigrulino, aŭ kontraŭe, ĉiam estas ne blanka sed nigra, kaj kiel longe la interedzeco ne okazas kaj la negroj restas aparta popolo, kiel longe unu regnanaro neigas al alia regnanaro socialajn kaj civilajn rajtojn, tiel longe ekzistos la antagonismo, la akrega malamo, kaj la rezultantaj gravegaj kaj seriozaj okazantaĵoj.

De tiam kiam holanda ŝipo en la jaro 1619 elŝipigis de Jamestown malgrandan bandon da Etiopanoj, la unuaj nigruloj en Ameriko, la ĉeestado de tiu popolo en Usono estis malbeno al la lando. Ĝi okazigis la plej grandan internan militadon en la historio de la mondo; ĝi venigis al la preskaŭa detruo la respublikon; ĝi ruinigis teritorion tiel grandan kiel imperio, kaj alportis al sennombraj miloj la malĝojon kaj la suferadon; ĝi alfrigis al la tombo pli ol milionon de junuloj de la nacio, kaj jen, hodiaŭ, post ĉiuj bataloj, la suferado, la mortado, post la sango perde verŝita, la trezoro elspezita, la sama problemo kiu tiel longe maltrankviligis la landon, ankoraŭ konstraŭstaras la amerikan nacion, nesolvita, nesolvebla.

H. Hall (Cleveland).

La Ŝtato Marilando oficiale aprobas Esperanton

Je la 11a de aprilo, 1910, Lia Moŝto Austin L. Crothers, Guberniestro de Marilando, subskribis la leĝoprojekton, kiu permesas la instruadon de Esperanto en la lernejoj publikaj de tiu ŝtato.

Tio ĉi estas la unua okazo en Usono, kiam iu ŝtato oficiale metas Esperanton en sian legaron. Tial sendube estos interese al niaj legantoj havi resumon de tiu ĉi leĝoprojekto, kiu nun fariĝis efektiva leĝo, kune kun mallonga redaktaĵo pri la tiel progresema ŝtato Marilando.

La leĝoprojekto estis enkondukata de la jena antaŭparolo:

« Vidante ke la Internacia Lingvo Esperanto faras efektivan progreson en multaj el la progresemaj nacioj de la mondo, kaj estas aprobita de kelkaj internaciaj kongresoj: kaj

« Vidante ke tiu ĉi lingvo kontentigas la longe sentitan bezonon por simpligata sed supera komunikilo inter la nacioj, ne elpuŝante naciajn lingvojn, sed provizanta duan lingvon al ĉiuj; tial

« Fariĝu leĝo de la Ĝenerala Konsilantaro de Marilando ke en ĉiu distrikta lernejo estu instruataj » (jen estas nomataj la ordinaraj fakoj de lernado) « kaj la elementoj de agrikultura scienco kaj la Internacia Lingvo Esperanto, povas, laŭ la kontrolo de la Ŝtata Konsilantaro pri Edukado, esti aldonitaj al la Fakoj, kiuj devas esti instruataj en la Ŝtataj Normalaj Lernejoj, kaj en la lernejoj publikaj de la diversaj regionoj de la Ŝtato. »

La konvinkado de la kongresanoj, ke ili devus fari tian leĝon, estas precipe farita de Sro. James L. Smiley, en Anapoliso, helpite de Sro. George Moss, en la sama urbo, kaj de Profesoro W. J. Spillman, kaj Sro. Karl F. Kellerman, de la Usona Agrikultura departmento en Washington, kaj de Sro. Edwin C. Reed, sekretario de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko kaj de la Sesa Kongreso.

La Ŝtato Marilando estas la plej proksima de la urbo Washington. De naturo, Marilando estas grandege favorata je kaj multeco kaj diverseco de produktaĵoj. Ĝia Chesapeake Bay (ĉesepik bej) la plej granda enlanda salakvo en Usono, estas riĉega je fiŝoj kaj ĉasaĵoj. Amasoj kaj aliaj birdoj vizitas ĝiajn bordojn en sia sezono, kaj el ĝiaj akvoj oni povas kapti krabojn, ostrojn, alozojn, perĉojn, haringojn, k. t. p. Oni povas same rakonti pri la produktemo de la lando. Ĝiaj fruktoj estas bongustegaj kaj multenombraj; fragoj kaj aliaj beroj, persikoj, pomoj, piroj, akvomelonoj, kaj diversaj legomoj troviĝas abunde.

La orienta bordo estos fama pro siaj bonegaj persikoj; la sudaj provincoj pro tabako. Tra la tuta ŝtato oni kreskigas maizon, tritikon, kaj aliajn grenojn. Veturante okcidenten, de tajdakvo ĝis la montoj, oni preterpasas riĉajn farmbienojn kies produktemo evidentiĝas per la grandegaj kaj belaj grenejoj. La montoj enhavas multege da terkarbo. Baltimoro, la metropolo, enhavanta proksimume 700.000 loĝantojn, estas la sidejo de la famkonata Johns Hopkins Universitato. Tiu ĉi urbo estas nomata « La monumenta urbo » pro la multeco kaj beleco de siaj monumentoj.

La ŝtata ĉefurbo, Annapoliso, sidante sur duoninsulo apud la rivero Severn, enhavas la « Ŝtaton Domon », la Kolegion, de Sto. Johano, kaj la faman Usonan Lernejon por Maraj Militistoj.

Marilando ĝojas ke « La Sesa » okazos la nunan jaron tiel proksime de siaj limoj, kaj klopodos por helpi la urbon Washington en korega bonveno al niaj vizitantoj de multaj nacioj.

E. C. R.

◆

Homara Dataro

Majo 16 1313. — Naskiĝas Johano Boccacci patro de la itala prozo (mortis 21/12 1375). — 1605, Paŭlo Va estas elektita papo. — 1616, Mortas en Leido la fama presisto Luizo Elzevir.

17. 1510. — Mortas pentristo Sandro Botticelli (nask. 1446 en Firenzo), kiu pentris la freskojn de la Sistina Kapelo. — 1888, Mortas en Cavezalle-Venacia, poeto Jakobo Zanella. — 1897, Mortas itala deputato Antono Fratti en la batalo ĉe Domokos en Grekujo. — 1796, Eniro de la franca soldataro en Venecion kaj falo de la Venecia Respubliko. — 1809, La ŝtato de la Eklezio estas kunigita kun la franca imperio.

18. 1291. — Almilito de Sankta Johano el Akri; la kristanoj perdas la lastan posedon en Palestino. — 1747, Bourger elpensas la heliometron. — 1800, Bonaparte transiras la montotrairejon de Sta Bernardo. — 1838, Mortas en Parizo la fama diplomatiisto Talleyrand. — 1882, Greeley atingas la nordan latitudon 83° 25', — 1498. Vasko de Gama alvenas à Calicut (Malabar).

19. 1506. Mortas Kristoforo Kolombo en Valladolid. — 1563. La edikto el Amboise (Indre-et-Loire) certigas al la ugonotoj liberecon de la kulto. — 1799. Mortas la fama franca komediverkisto Beaumarchais.

20. 1347. Ribelo de Romo estrita de Kola de Rienzo. — 1674. Johano Sobieski estas elektita reĝo de Polujo. — 1501. João da Nova malkovras la insulon Ascensio.

21. 1639. Mortas en Parizo - Tomaso Campanella (nask. 5/9 1568 en Stilo) monaĥo Dominikana, granda filozofo kiu restis 25 jarojn en malliberejo pro siaj liberalaj ideoj. — 1528. Mortas Alberto Dürer skolestro de la germana pentrarto. — 1881. Inaŭguro de la tunelo sur la monto Sankta-Gothardo. — 21-22 1809. Venko de la Aŭstrianoj sur la Francoj ĉe Aspern. — — 1791. Komenciĝo de la Komuno en Parizo.

22. 337. — Mortas Flavio Valerio Konstanteno la Unua, la Granda (n. 28/2 274 en Naisso). — 1502, João de Novra malkovras la insulan Sankta Heleno. — 1813. Naskiĝas en Leipzigo, komponisto Richard Wagner. 1885. Mortas Viktor Hugo.

23. 1498. Jeronimo Savonarola estas bruligita, vivanta en Firenzo.

24. 1543. Mortas en Nuremberg Nikolo Koperniko el Thorn (nask. 19/2 1473) aŭtoro de la astronomia sistemo dirita Kopernika. — 1803. Naskiĝas princo Karlo Lorenco Bonaparto el Kanino, kaj Musignano naturisto (mort, 29/7 1857). — 1881. Inaŭguro de la ponto de Brooklin en Nova-Yorko.

25. 1265. — Naskiĝas Dante Allighieri en Firenzo. — 1321. Mortas D. Alighieri. 1835. Mortas Renato Caillée (nask. en 1799 en Mauré) glora esploristo, kiu vojaĝis al Timbuctu. — 1866. Mortas Anĝelo Brofferio (n. en 1802 en Castelnuovo Calcea) piemonta poeto kaj politikisto. — 1899. Mortas en Sankta Petro de Pinatar (Murĉio) la fama oratoro Emilo Castelar.

26. 1805. Napoleono estas kronita itala reĝo en la ĉepfreĝejo el Milano. — 1831. Pendigo de Ĉiro Menotti, patrioto en Modeno. — 1885. Enterigo de Viktor Hugo en la Panteono en Parizo.

27. 1797. Socialisto Babeuf estas gilotinita en Parizo. — 1840. Mortas la plej granda violonisto, Nikolo Paganini.

28. 1540. Mortas firenca historiisto Francisko Guicciardini. — 28-29, 1875. Paŭlo Bogton transiras naĝante la markolon « la Manche ».

29. 1176. Batalo ĉe Legnano, venkita de la Lombardoj Konfederaciitaj. — 1453. Mortas Konstantino XIII, paeologo, lasta romana imperiestro en Oriento.

30. 1498. Kolombo entreprenas sian 3an vojaĝon al Ameriko, forveturante el S. Luko el Barrameda. — 1835. Interkonsento de Tafna de kiu komenciĝas la almilito de Alĝerio je parto de Francujo. — 1744. Mortas en Londono la fama angla filozofo Aleksandro Pope. — 1788. Mortas en Parizo la mondfama poeto, dramaŭtoro, historiisto kaj filozofo Voltaire. — 1840. La piemontanoj venkas la aŭstrianojn ĉe Goito.

31. 1594. Mortas en Venecio pentristo Robusti, nomita Tintoretto. — 1809. Mortas fama komponisto Francisko Josefo Haydn. — 1364. Kazimiro Granda donacas privilegiojn al la Krakova Akademio.

A. Tellini.

◆

La Faktoj

18 Aprilo. — Chang-Sha (Ĥinujo). — Gravaj manifestadoj por timo de malsatego. La guberniestro estas inside mortigita.

Budapeŝto. — Alveturo de Roosevelt.

Katanio. — La elsputo de la Etna ĉesas.

19. Peterburgo. — Oni malkovras novan militistan revolucian organizon kiu preparis atencon kontraŭ la imperiestra familio.

Parizo. — Inaŭguro de internacia konferenco kontraŭ la negoco de la blankulinoj.

Washingtono. — La voĉdonantinoj ekokupas la du ĉambrojn de la riprezentantoj kaj prezentas petskribon.

Forino. — Fermo de la Kongreso de aerveturado.

20. Kometo Halley atingas la perihelion, nome la punkton plej proksiman al la suno, de kiu ĝi estas malproksima 90 milionojn da kilometroj.

21. Romo. — Grandaj festoj por la fondotago de la urbo.

Parizo. — Alveturo de Roosevelt.

Kubo. — Sanga ribelado sub la ordono de negra generalo Evaristo Estenaz.

Usono. — Mortas klera literaturisto Mark Twain.

Moskvo. — Oni ŝtelas sanktan bildon kun juveloj kiu valoras milionon da spesmiloj.

22. Parizo. — Roosevelt vizitas la prezidanton de la Respubliko.

Nico. — Aviadisto Vanderbôn trairas per areoplano 20 kilometrojn kunportante pasaĝerojn.

Addis Abeba. — Oni arestas Ras Gugsa, fils de Ras Ollé kaj nevo de imperiestrino Faitŭ, por suspekto de konspiro kontraŭ la regecon de Abisinujo.

23. Venecio. — Inaŭguro de la IX internacia ekspozicio de Belartoj.

Moskvo. — Oni arestas la ŝtelistojn de la juveloj de la sankta bildo kaj oni reposedas la ŝtelitaĵon.

Londono. — Oni inaŭguras la radiotelegrafion senperan kaj oficialan trans la Atlantika oceano.

Bruselo. — Inaŭguro de la tutmonda ekspozicio.

24. Francujo. — Ĝeneralaj balotoj.

Albanio. — Batalo inter dek mil Albanianoj kaj ok turkaj batalionoj.

Moskvo. — Granddukino Elizabeto, vidvino de Grandukо Sergio, estis sanktigita abatino de la monaĥinoj de Mario.

25. Romo. — Alveturo de Princo Alberto Ia el Monako.

Limburgo. — Direktebla aerŝipo Zeppelin II estis detruita de la vento.

26. Milano. — Mortas dramaktoro Andrea Maggi.

Parizo. — Mortas Henriko Barboux, unu el la plej famaj francaj juristoj. — Mortas Bjornstierne Bjorson.

27. Romo. — Princo de Monako faras en la Roma kolegio alparoladon pri oceanografio.

Manĉester. — Paulhan gajnas premion da 100.000 Sm. pro la traveturo en aeroplano de Londono al Manĉester.

Usono. — En la karbminejo de Tynibedow, 500 ministoj restas enterigitaj.

28. Romo. — Nova ministraro, estrita de Luzzatti, prezentas sin al la Deputataro; ĝia programo estas bone akceptita.

Albanio. — Grava batalo inter ribelantoj kaj turka soldataro ĉe Katscianik.

Bruselo. — Alveturo de Roosevelt.

30. Romo. — Ministraro Luzzatti ricevas grandegan plimulton en la Deputataro.

Amsterdamo. — Alveturo de Roosevelt.

Argentinoj. — Domingo Perez estas elektita prezidanto de la Senato.

1 Majo. — Ĉie oni festas pace kaj trankvile la 1an de majo.

A. Tellini.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(U. E. A.)

OFICIALA INFORMILO

ADMINISTRA FAKO

Diversaj avizoj.

∴ Nova serio de la *Oficiala Jarlibro* ĵus aperis, korektita kaj kompletigita.

∴ Laŭ peto de diversaj personoj ni nun fabrikigas insignojn de U. E. A. por *butontruo*; ili kostos 48 Sd.

∴ La regularo pri la informpetoj kaj pri la Kongresoj aperos en la venonta eldono de nia Jarlibro. Dume, niaj Del. bonvolu zorge konservi la N-ojn. en kiuj ili aperis.

∴ La elektado de la *distriktaj Delegitoj* estos plenumata laŭ instrukcioj entenataj en Bulteno No 6.

∴ Ni tre petas ĉiujn estrojn de rondiro en ĉiu distrikto, ke ili bonvolu resendi la rondirantan distriktan kajeron, aŭ, se ili ĝin ne ankoraŭ havos, informiĝi kie ĝi troviĝas. Estas necese, ke por la Kongreso ni posedu ĉiujn kajerojn, tiel ke ni povu verki raporton pri ili.

Novaj Delegitoj.

Ĝis la 1a de majo estis elektitaj la jenaj Delegitoj:

Adelaïde (Suda Aŭstralio). — S-ro W. D. Smith, Rog. Letter. Dept. G. P. O.

Bonn (Okcid. Germanujo). — S-ro P. Radermacher, Markusstr. 24.

Charters Towers (Aŭstralio). — S-ro W. L. Millett.

Elberfeld (Okcid. Germanujo). — S-ro G. Hillebrecht, Vogelsangerstr. 81.

Esschen (Belgujo). — S-ro J. Van Hengel, rue de la Station, A. 311.

Grimstad (Norvegujo). — S-ro S. Westhayen.

Habana (Kubo, Antiloj). — S-ro A. A. Ruiz, Neptuno 57, Apartado 1324.

Hobart (Tasmanio, Aŭstralio). — S-ro K. Dear, Cathedral Chr.

Kladno (Bohemujo). — S-ro Jar Pelc, Kladno 174.

Kovno (Okcid. Rusujo). — S-ro A. Nedoŝivin, Mihajlovskij prosp.

Litovel (Bohemujo). — S-ro Klement Arban.

Lons-le-Saulnier (Burgonjo). — S-ro B. Payebin, 37, rue du Jura.

Mainz (Sud-Okcid. Germanujo). — S-ro P. Usinger, Ludwigstr. 16.

Moulin-Rouge (Burgonjo). — S-ro J. Crébély.

Rochefort-sur-Mer (Sud-Okc. Francujo). S-ro E. Gilson, licea profesora.

Rockhampton (Aŭstralio). — S-ro C. S. Price, c/o N. Z. Insurance Co.

Stirling (Skotlando). — S-ro R. J. Molaren, 64, Port St.

Townsville (Aŭstralio). — S-ro Lalor, Harbour Board.

Wyŝni-Woloĉok (Centra Rusujo). — S-ro E. Freibourg, inĝeniero.

Yverdon (Svisujo). — S-ro A. Gaydou, Suchy.

Zofingen (Svisvjo). — S-ro Fahrni-Diebold, teknikisto.

Entute 862 lokoj.

ŜANĜOJ. — Braunschweig: La Del. F-ino Jahns, loĝas nun Bodestr. 12 I. — Calais: La nuna Del. estas nun S-ro leŭt. Leclancher, 8e de ligne. — Cherbourg: La Del. estas nun S-ro Ragoudet, 1, rue de l'Alma. — Ĥarbin: La Del. estas nun S-ro Liseckij, Upravlenié k. b. j. d., sluĵba pati. — Hilversum: La Del., S-ro Von Romer, loĝas nun Bussumer Grintweg, 41. — Jena: La Del. estas nun S-ro Carnap, Lindenhohe. — Madrid: La Del. estas nun S-ro A. Lozano, Str. Baileu, 24. — Messina: La Del. estas nun S-ro Fioravanti-Cinci, Soc. Anon. Ferrobeton. — Sydney: La Del. de Sydney, S-ro Watson, loĝas nun 71 Castleregh Str. — Weimar: La Del. estas nun S-ro P. Froherz, Granachstr. 32. — Zagreb: La Del. S-ro Stalger, loĝas Frankopansko 16-II.

Plenrajtaj Delegitoj.

Fariĝis plenrajtaj Delegitoj, t. e. varbis pli ol 20 membroj de 1a de Aprilo:

Dijon (Th. Rousseau) 31; Firenze (Scarselli) 22; Kovno (Nedoŝivin) 26; Maitland (Pryke) 21; Osijek (Kaniĉar) 26; Voronej (Vasiljev) 35.

Esperantiaj Asocioj

Firenze. — *Itala Federacio Esperantista.*

Firenze. — *Grupo Esperantista.*

Entute 24 Esperantiaj Asocioj.

Esperantiaj Entreprenoj

Bukarest. — *Editura Esperanto*, D-ro G. Robin. Adr.: 5, Str. Bratiann.

Bukarest. — *Rumana Esperantista Societo.* P.: D-ro G. Robin.

Ĉaslav. — *Esperantista Klubo.* P.: A. Horaĉek; VP.: Fr. Skrivanek; S.: M. Mrazkova.

Christiania. — *Patentoficejo.* B. Klingenberg, Dahlsgade 18 III.

Hedemora. — *Sveda Esperantisto.* Red.: J. Lundgren.

Hannover. — *Manufakturo de cigaroj « de ŝtonego al maro ».* A. Winhelhaye. Adr.: Enger en Westfalen.

Moskvo. — *Societo Esperantista.* Adr.: Pokcovka, 45.

Moskvo. — *Komerca Domo « Teĥnik ».* Vendado de teknikaj komercaĵoj. Poŝta kesto 846.

Neuchatel. — *Grupo Esperantista.* P.: G. Stroele; VP.: F-ino A. Adam; S.: F-ino Schütz; K.: Ch. Perret. Adr.: Palais 3.

Paris. — *Association de la Paix par le Droit.* P.: Th. Ruyssen; VP.: L. Le Foyer; S.: J. Prudhommeaux; K.: A. Laume, P. Coutant; H. Babut; Justin Godart; P. Nattan-Arrier. Adr.: 43, Faubourg Saint-Honoré, Paris.

Roznov. — *Hotelo Cerny.* Posedanto: I. Ĉerny.

Ufa. — *Drogejo, Fotografilejo, Muzikilejo, Dvorjec.* Adr.: Centralnaja, 20.

Entute 141 Esperantiaj Entreprenoj.

Balotado de la Delegitoj

Lastaj Rezultatoj (1)

La unua cifero montras la nombron de la membroj, la dua la nombron de la voĉdonintoj, la cifero post la nomo la nombron de voĉoj ricevitaj.

La nomoj italike presitaj estas novaj Del. aŭ Vicdel. — D = Delegito; VD = Vicdelegito.

Augsburg. 26; 24. — D: W. Beideck 23; J. Freund 1. — VD: *J. Freund* 17; J. Schmalzl 3; W. Beideck 1; R. Scholz 1; J. Arnold 1.

Burnley. 20; 19. — D: H. Hardaker 19. — VD: C. Hartley 19.

Dresden. 52; 28. — D: F. Radeck 28. — VD: *W. Gross* 26.

Eskiltuna. 20; 12. — D: H. Holmstrom 10; E. Johnson 1; Andersson 1. — VD: E. Johnson 10; H. Holmstrom 1; J. Johnsson 1.

Genève. 26; 9. — D: *Ed. Stettler* 9. — VD: *Ed. Cabaret* 9.

Kopenhag. 26; 19. — D: A.-B. Hansen 18; Fno Hœst 1. — VD: Fno Hœst 18; A.-B. Hansen 1.

Londono. 50; 8. — D: Ph. Kaliski 8. — VD: P. Blaise 8.

Paris-II. 50; 26. — D: G. Warnier 17. — VD: *G. Chavet* 20; *Génermont* 9.

Praha-II. 20; 18. — D: V. Krauss 16.

Sydney. 40; 20. — D: Bf. Watson 20. — VD: *W. Shneider* 20.

⁂

La nomo de S-ro. Radeck, Del. en Dresden, estis erare citita en nia gazeto. La protokolo pri la rebalotado en lia regiono estis ĝustatempe ricevita.

◆

Ia Kongreso de U. E. A.

AUGSBURG

28 julio-3 aŭgusto 1910

Al Ĉiuj Esperantianoj,

Ni havas la honoron inviti vin partopreni en la 1a Kongreso de U. E. A. (por Eŭropo), kiu okazos en *Augsburg* (Bavarujo) de la 28a de Julio ĝis la 3a de Aŭgusto 1910.

La celo de tiu unua Kongreso de nia Asocio estas duobla: unuflanke interŝanĝi ideojn kaj projektojn pri la plivastigo de U. E. A., aŭdi pri ĝia nuna situacio, ĝiaj metodoj, ĝiaj principoj, fiksi la grandajn liniojn de ĝia laboro dum la venonta jaro, esprimi la bezonojn kaj dezirojn de la Esperantianaro laŭ kiuj la Komitato poste agados; aliflanke ebligi pli intiman konatiĝon kaj amikiĝon inter niaj ĉiuregionaj membroj, ilin alproksimigi dum kelkaj tagoj tiel ke ĉiu povu profiti la sperton de la alia kaj per tiu kunlaborado, kiun ebligas la dumkongresa kunvivado, pligrandiĝu la sento de solidareco inter Esperantianoj kaj la fervoreco pri U. E. A.

La urbo Augsburg kuŝas en la centro de Eŭropo; ĝi do estas facile alirebla por ĉiuj popoloj. Plie, krom la labora parto interesa kaj originala, la Kongreso prezentas ne kompareblajn allogaĵojn, kiuj solaj valoras la vojaĝon Augburgon: vizito de la mondfamaj reĝaj kasteloj de Füssen-Neuschwanstein kaj, tuj post la Kongreso, ekskurso al Munĥeno, Oberammergaŭ, kie okazas la tutmonde konataj Ludoj de la Kristsuferado (nur ĉiudekjare) kaj al Bavaraj Alpoj, en plej favoraj kaj certe neretroveblaj kondiĉoj.

La loka organizantaro fervore laboras por la aranĝo de la Kongreso kaj oni de nun povas esti certa pri gastema kaj samideana bonakcepto.

Dum la sama epoko okazos en Augsburg Kongreso de *Germana Esperantista Asocio*, de *Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio* kaj aliaj fakaj societoj.

Ni do esperas, Karaj Samideanoj, ke vi bonvolos fari ĉion eblan por ĉeesti en tiu grava manifestado kaj sendi al ni *kiel eble plej rapide la ĉikunan aliĝilon.*

La Komitato de U. E. A.:

H. Bolingbroke Mudie, Prezidanto.

H. Hodler, Vic-Prezidanto, Administra fako.

GRAVA AVIZO. — La personoj, kiuj tute ne povas ĉeesti la Kongreson estas insiste petataj mendi *helpkongresan karton* po 1 Sm. Tiu karto celas faciligi la financan aranĝon de la Kongreso; ĝi rajtigos al senpaga ricevado de la Kongresa Raportaro. Personoj, kiuj aliĝas kiel helpkongresanoj, povas ĉiam poste aliĝi kiel Kongresanoj, pagante 2 Sm. plue.

Provizora programo de la Kongreso

Honora Prezidanto: S-ro Wolfram, ĉefurbestro de Augsburg.

Ĵaŭdon 28 Julio. — 5 h., Solena Malferma Kunveno. — 7 h., Granda komuna festeno.

Vendredon 29. — 9 h. 1/2, 1a Labora Kunveno (pri Administra fako). — 3 h., 2a Labora kunveno (pri financa fako).

Sabaton 30. — 9 h. 1/2, 3a Labora kunveno (pri fakoj konsuloj et Esperanto-Oficejoj). — 3 h., 4a Labora kunveno (pri Junula fako).

Dimanĉon 31. — Komuna ekskurso al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein kun komuna manĝo.

Lundon 1a Aŭgusto. — 9 h. 1/2, 5a Labora kunveno (pri komerca fako). — 3 h., 6a Labora kunveno (pri komerca fako). — 5 h. 1/2, Malfermo de la Kongreso de Teka. — 8 h. 1/2, Granda Vesperfesto.

Mardon 2. — 9 h. 1/2, 7a Labora kunveno (pri turisma fako). — 3 h., Ferma kunveno; alpreno de la deziresprimoj. — 5 h. 1/2, Kunveno de Teka. — 7 h. Granda komuna festeno.

Merkredon 3. — Kunvenoj de Teka kaj diversaj Esperantiaj Asocioj kaj Entreprenoj.

Ĵaŭdon 4, Vendredon 5, Sabaton 6. — Vizito de Munĥeno.

Dimanĉon 7. — Vizito al la prezentado de Oberammergau kaj eventuale ekskurso al Bavaraj Alpoj.

⁂

KUNVENOJ. — La Kunvenoj okazos en la belega hotelo 3. Mohren. La *detala* tagordo de tiuj kunvenoj aperos en « Esperanto » kaj estos sendata al ĉiuj kongresanoj.

LOĜADO. — Estos eldonataj 3 klasoj de kuponaroj (1). En ĉiu kuponaro estas entenataj 6 noktoj, kun frua matenmanĝo, tag. kaj vespermanĝoj dum la tuta kongreso kaj ekskurso al Neuschwanstein (kun vagonaro, vizitado kaj manĝo). La fruaj matenmanĝoj okazos en la hoteloj; la festenoj en la hotelo 3. Mohren, kaj la komunaj ĉiutagaj tag. kaj vespermanĝoj en bierhaloj. La diferenco de prezo inter la tri klasoj estas kaŭzata de la diverseco de la ĉambroj; la manĝoj kostos saman prezon por ĉiuj kongresanoj.

VOJAĜO. — Jen la kosto de la vojaĝo Augsburgon de kelkaj urboj:

Basel, II-a klaso Sm. 12,60, III-a klaso Sm. 8,20; *Genevo*, II-a 17,85, III-a 12,15; *Marseille*, II-a Sm. 32,95, III-a 16; *Milano*, II-a 23,30, III-a 14.10; *Genova*, II-a 25,10, III-a 16.95; *Nancy*, II-a 14, III-a 9; *Parizo*, II-a 24, III 16,05; *Bruselo*, II-a 21,25, III-a 13,40; *London*, II-a 34,35; *Rotterdam*, II-a 22, III-a 14,25; *Hamburg*, II-a 17,85, III-a 11,60; *Breslau*, II-a 18,75, III a 12,20; *Praha*, II-a 13-20, III-a 7,00: *Wien*, II-a 15,85, II-a 9; *Budapest*, II-a 24,45, III-a 12,75; *Firenze*. II-a 25,90, III-a 16,20.

Por ricevi la prezojn de *iro* kaj *reiro* oni duobligu la suprajn prezojn.

La personoj, kiuj dezirus uzi rondvojaĝan bileton, trovos la necesajn informojn ĉe la stacidomoj de la ĉefaj urboj.

KONGRESKARTOJ. — La Kongreskarto kostas *3 Sm.* Ĝi rajtigas al ĉeestado je ĉiuj kunvenoj kaj senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas necesega por la ricevo de la kuponaro.

Karto de helpkongresano kostas 1 Sm.; ĝi rajtigas je senpaga ricevado de la dokumentoj; ĝi estas difinita por la personoj, kiuj ne veturas al la Kongreso. Helpkongresanoj povas ĉiam fariĝi kongresanoj, pagante 2 Sm. pluajn.

⁂

Por *aliĝi* oni bonvolu plenigi la aliĝilon kiu troviĝas en tiu No kaj ĝin sendi *plej rapide* al la Centra Oficejo de U. E. A., 10, rue de la Bourse, *Genève, kun la responda monsumo* (poŝtmandate, bankbilete aŭ ĉeke). Oni ricevos interŝanĝe sian kongreskarton kaj kvitancon por la kuponaro. Tiun kvitancon oni nur bezonos interŝanĝi kontraŭ la definitiva kuponaro ĉe sia alveno en Augsburg. La definitivan programon de la kongreso oni ricevos du semajnojn antaŭ la kongreso.

Vidu la aliĝilon sur la 4a paĝo

---

(1) La publikigo de tiu listo estis prokrastita.

(1) Ia Klaso Sm. 18, IIa klaso Sm. 23, IIIa klaso Sm. 20.

Esperantiaj Informoj

Cartagena (Hispan.). — La gazeto *Manana* longe raportis pri nia Kongreso en Augsburg.

Firenze (Italujo). — Fondiĝis gastotablo en la bierorejo Paskovsky, placo Vittorio Emanuele; trapasantoj invitataj.

Haarlem (Nederlando). — La grupo de tiu urbo eldonis belan gvidlibreton kiun ĝi sendis al ĉiuj Del. (Kinderhuissingel, 30. Haarlem).

Paris (Franc.). — La grava franca societo *La Paix par le Droit* (Placo per la Juro) aliĝis al U. E. A. kiel Esperantia entrepreno. Tio estas grava akiro por nia afero. La revuo « La Paix par le Droit » publikigis bonegan artikolon pri U. E. A. kaj nia Kongreso.

Praha (Bohem.). — La Landa Ligo Bohema por akceli la turisman movadon fariĝis Esperantia entrepreno; ĝi eldonas kun U. E. A. la Esp. Gvidfolion de Praha.

Rio-de-Janeiro (Brazil.) — Plensukcesa akcepto estis organizita je la okazo de la reveno de S-ro J. Keating, nia Del. en Campinas, kiu faris tra Eŭropo longan vojaĝon, dum kiu li havis la okazon ofte uzi la servojn de nia Asocio.

Varsovio (Polujo). — La Orientgermana Esp. Ligo aranĝas ekskurson en Ciechocinek, apud Germana limstacio Thorn. Partoprenos Esp.-ianoj el Varsovio, Lowicz, Wesclawek kaj aliaj urboj.

Warwick (Aŭstralio). — Nia Del, S-ro P. W. Pears, interviuvis S-ron Kidston, ĉefministro de la Registaro de Queensland kaj li afable permesis konigi, ke la registara « Intelligence Tourist Bureau », Treasury, Building, Brisbane, de nun korespondos Esp. Tio ĉi estas tre ŝatinda permeso ĉar multaj fremduloj jam enmigris Queensland. Tiu ŝtato estas taŭgega por elmigrantoj laŭ boneco de la klimato kaj tero, ktp. La nombro de la tieaj Esp.-ianoj kreskas iom post iom.

Genova (Italujo). — Artikoloj pri la progresoj de Esperanto kaj U. E. A. aperis en la gazeto Caffaro, en H. Lavoro de Genova, en la revuo Diritti della Senolla, k. t. p.

Gorizio (Istrio). — Okazis sukcesa parolado pri Esp. kaj U. E. A., farita de S-ro Pohusta, Del. en Trieste. Esp.-kurso sekvos.

Irkutsk (Siberio). — La tiea Del., S-ro Perott, atingis tiun belan rezultaton, ke la ĉitiea Esperantianaro superas nun 70. Ekzemplo imitota ankaŭ ekster Siberio.

Koeln (Okcid. Germanujo). — En la Esperanto-Societo 1906 Kœln, S-ro Deimann faris tre efikan propag, paroladon pri U. E. A.; sekvis 15 pluaj aliĝoj.

Serres (Sud-Orient.-Francujo). — Sukcesan paroladon pri Esp. kaj U. E. A., aranĝitan de nia fervora Del. en la Alpaj regionoj S-ro Faucher, faris S-ro Drudin, Vicdel. en Lyon. Ĉarma festo sekvis en kiu oni tostis al la sukceso de U. E. A. kaj Esperantismo.

Limoges (France). — La Urbestraro de Limoges, organizos dum la somero grandan Internacian Muzikan Konkurson. La Del. kaj ankaŭ ĉiuj aliaj Esp.-istoj estas petataj tion konigi al la muzikistaj societoj de sia regiono. Por pluaj informoj, oni sin turnu al S-ro Soullier, sekretario de la Muzika Konkurso, Mairie, Limoges (Francujo).

⁂

Por Esperanto, mi petas ĉiujn Delegitojn, atenti pri la supra avizo, kaj zorgi pri ĝi.

La Del.

Dusseldorf (Germanujo). — En junio 1910 okazos internacia kongreso de ministoj kaj praktikaj geologoj, kiu altiras grandan nombron da samfakanoj. La tiea Del. jam rilatis kun la kongreskomitato, tre inklina al Esp. Ili konsentis, ke estos aranĝita speciala Esp. kunveno, por montri al la kongresanoj ke Esp. estas la plej taŭga por ĉiaj rilatoj internaciaj. Inter la kongresanoj supozeble troviĝas ankaŭ Esp.-istoj kies helpon ni nepre bezonas. La kongreskomitato petas ke bonvolu sciigi al ĝi siajn intencojn, por ke ĝi povu dissendi programojn; ili sciigu ankaŭ la tiean Del. kaj petu senpagan gvidilon de la « Verkehrsverein », Graf-Adolstr. 91. Dusseldorf. La adreso de l'kongreskomitato estas: « Intern. Kongress für Bergban, Iakobistr. 3/5, Düsseldorf.

Ni insiste petas niajn Del., ke ili bonvolu konigi al ni ĉiujn novaĵojn rilatojn al la Esperantia movado en sia regiono, sed ĉiam resume, ĉar la malmulteco da spaco devigas nin mallongigi la ne sufiĉe koncizajn komunikaĵojn. Oni redaktu tiujn informojn sur aparta folio tre legeble.

(Red.).

Esperantia Parolejo

Al la Esperantistoj Horloĝistaj

En la tuta mondo nia kara lingvo nune progresas rapide kaj ni ĉiuj ĝojas pri tio sed por agi pli efike ni devas agi kune kaj la plej taŭga rimedo por tio estas la Asocio. Jam multe da metiistoj komprenante la utilecon kiun la internacia lingvo povos fari al ili fondis metiajn asociojn ekzemple: la kuracistoj, la instruistoj, la fervojoficistoj. Kial la horloĝistoj ne povus ilin imiti? La utileco estos ankaŭ grandega por ni. Efektive multe da poŝhorloĝaj fabrikejoj estas lokitaj ĉe Svisujo, ĉu Francujo, ĉu Germanujo. Do,kiam ekzemple Angla horloĝisto bezonas aĉeti poŝhorloĝojn, li estas devigata sin turni al makleristo. Tiu-ĉi kompreneble vendas la komercaĵojn pli malkare al la fabrikistoj ĉar li bezonas perlabori sian vivon kaj la enspezo estas tiom pli malgranda por la vendonto po malgrande. Plie ĉu internacia lingvo ne estas la plej taŭga rimedo por faciligi la eksterlandiĝon de laboristoj kaj mi memoras ke mi legis antaŭ kelkaj monatoj artikolon elmontrantan la utilecon de la laboro ĉe fremdaj landoj en la gazeto « France Horlogère » (Horloĝista Franclando). Kia societo povus pli bone efektivigi tian projekton ol Esperantista Asocio, la sola kiu povas havi anojn sin komprenantajn reciproke ĉe ĉiuj landoj de la tero.

Do jen estas provizora regularo de Internacia, Esperantista Horloĝista Asocio.

1ª Societo de Esperantistaj Horloĝistoj estas fondita sub la nomo Internacia Esperantista Horloĝista Asocio.

2ª Ĝi celas propagandi inter la horloĝistoj la Zamenhofan lingvon por ke ili povu poste ĝin uzi laŭ siaj bezonoj.

3ª Ĉiu ano de la Asocio devos esti ano de U. E. A.

4ª La Asocio klopodos por Esperantistigi poŝhorloĝajn fabrikejojn.

5ª Speciala fako estos rezervita por la anoj kiuj deziros labori el siaj landoj.

6ª La Asocio per la helpo de ĉiuj siaj anoj verkos teknikan horloĝistan vortaron.

7ª La anoj de la Asocio estos devigataj sin helpi reciproke kiam tio estos necesa.

8ª Tiu-ĉi regularo estas nur provizora kaj fina regularo povos esti plene akceptata nur laŭ la deziroj de la Asocianoj.

Ĉiuj personoj kiuj interesiĝos je tiu ideo estas petataj sin turni ĉu al S-ro G. Bury, 66, Oak Leigh Ine Brook en Liverpool Anglolando, ĉu al S-ro P. Gabory, 149, rue de Paris en Pantin (Seine) Franclando, kiuj akceptos plezurege ĉiujn interesajn proponojn kaj enskribos ĝoje la anojn. Ili ankaŭ sendos pluajn sciigojn al ĉiu, kiu petos ilin pri tio.

P. Gabory,
Paris en Pantin (Seine) Franclando.

Internacia Ligo de Kelneroj

Ju pli multe da praktikaj servoj prezentas al ni nia lingvo des pli nombraj fariĝas la profesiaj societoj celantaj proksimigi la samprofesianojn de la tuta mondo.

Ĉiu kongreso donas al ni okazon konvinkiĝi, ke ne la lasta profesio, kiu bezonas komunan komunikilon kaj kiu ĝin samtempe uzados rilate la plej vastan publikon, estas la profesio kelnera, verdire internacia laŭ la plena senco de vorto.

Esperantistaj kelneroj, kiuj volas klopodi pri starigo de tia Ligo kaj organizo de siaj vicoj, fidas kunhelpon de la publiko kaj firme esperas, ke ilia laboro estos aprobata de ĉiuj. La rezultato de tia laboro dependas ankaŭ de tio, se la samideanoj mem persiste postulados en la hoteloj, restoracioj k. t. p. priservon esperantan.

Ne estas bezone ĉi-tiuloke citi la gravan bezonon de suprenomita Ligo kaj tial ni konsideras sufiĉa anonci al ĉiuj amikoj de nia ideo, kiuj nin volas helpi ke ili sendu al mi sian adreson, proponojn k. t. p. Adreso: Erhard Urban, kelnero, Esperanto-kafejo « Union » en Praha I. Ferdinandova trida 842. Bohemujo-Aŭstrio.

VARIETEA MONDO

Antaŭ kelke da tempo ni jam anoncis, ke la estraro fabrikigos por la liganoj kaj konsuloj apartajn emblemojn, kiuj nun estas pretaj. Laŭ la apuda bildo la emblemo konsistas el pinglo kun ronda signo, kiu havas belegan eksteraĵon. Sur orflava fondo ĉirkaŭita de blanka rando troviĝas la verda stelo. Blanka strio de la mezo de l'tuta signo portas la literojn V. E. L.

Pro la okulfrapanta eksteraĵo la signo estos tre bona propagandilo al niaj liganoj, kaj ni esperas, ke ĝi varbos al nia ligo multe da novaj membroj kaj amikoj. Samtempe ĉi-tiu emblemo estos ankaŭ rekonilo por ĉiuj liganoj kaj konsuloj en niaj kunvenoj, k. t. p. Pro tio ni petas, ke ĉiu konsulo kaj ligano aĉetu ĉi-tiun signon. Ĝi nur estas havebla por liganoj kaj konsuloj el la oficejo de V. E. L. kaj kostas afrankite por Germanujo 0,45 Sm., por la eksterlando 0,50 Sm. La prezon oni sendu nur per poŝtmandato, ne per poŝtmarkoj. Ĉiujn mendojn oni adresu kiel eble plej baldaŭ al la ĝenerala sekretario de V. E. L., S-ro Otto Linse, Leipzig, Kurprinzstrato, 22, III (Germanujo).



⁂

Kiel konsuloj de nia ligo estis nomataj:

Anglujo. Bradford (Yorkshire), S-ro A. Tuke Priestmann, Welbury Drive, 7.

Germanujo. Chemnitz. S-ro Hans Huler, Ing., Innere Johannisstrasse, 2, III.

Hispanujo. Gerona. S-ro Ernesto A. Dalman, strato Balesterias, 21.

Internacia Instituto de Esperanto

(*Daŭrigo*)

Helpa Konsilantaro de l'Instituto

Prezidanto :

Anton Grabowski (A.) (1), prezidanto de l'Varsovia Esperanta Societo.

Vic-prezidantoj :

Theophile Cart (A.), profesoro ĉe la Pariza Lernejo de politikaj sciencoj kaj ĉe la Liceo de Henri IV.

E. Wackrill (A.), redaptoro de *British Esperantist*.

Anoj :

Clarence Bicknell (L. K.) (2), esperanto-verkisto en Bordighera.

Kasimierz Bein-Kabe (A.), esperanto-verkisto en Varsovio.

Emile Boirac (A.), rektoro de l'Dijona Universitato.

J. Borel (L. K.), direktoro de *Germana Esperantisto*.

Carlo Bourlet (L. K.), profesoro ĉe la Pariza Belarta Lernejo.

M.-C. Butler (L. K.) sekretario de la Londona Grupo Esperontista.

Th. Ĉejka (L. K.), direktoro de la *Pedagogia Revuo*.

Romano Frenkel, inspektoro de lernejoj en Enisejsk.

Hector Hodler, direktoro de *Esperanto*.

Margaret Jones (L. K.), direktorino de la Esperanto-lernejo en Liverpool.

Ed. Kühnl (L. K.), redaktoro de *Ĉasopis Esperantist* en Praha.

H.-B. Mudie (L. K.) prezidanto de U. E. A.

D-ro Mybs (A.), prezidanto de l'Germana Esperantista Asocio.

A. Millidge (L. K.), redaktoro de *British Esperantist*.

D-ro Ostrovski, fondito de *Esperanto* en Jolta.

Benedict Papot (L. K.), profesoro ĉe la Chautauqua Instituto.

D-ro R. de Saussure (A), direktoro de la *Scienca Oficejo* en Ĝenevo.

Generalo Sébert (L. K.), ano de l'Franca Akademio de Sciencoj.

D-ro Leono Zamenhof (L. K.), redaktoro de *Pola Esperantisto*.

Direkcio de l'Instituto

19, Pont-d'Arve, Genève (Svisujo)

Prezidanto : Edmond Privat (L. K.).

Vic-prezid. : A. Milson (E. Ramo).

Ĝenerala sekretario : Edmond Bouvier.

Oficiala de l'internacia juĝantaro por la skribaj ekzamenoj : D-ro Ostrovski.

Oficiala organo : « Esperanto »; dir.: H. Hodler.

Kasbanko : Bankverein Suisse, London, Genève, Basel, Zürich.

Listo de la Ĝisnunaj Juĝantoj en Eŭropo

Regiono: Centra Francujo; Ĉefjuĝanto, S-ro M. J. Evrot, Limoges; Helpantoj, S-ro Pingriveaux, S-ro Texeraud.

Regiono: Norda Francujo; S-ro F. Durieux Lille (31, rue de Bouvines); Helpantoj: F-ino A. Sombret, S-ro G. Barat.

Regiono: Parizo; Ĉefjuĝanto: Prof. Th. Cart, Paris (12, rue Soufflot).

Regiono: Sud-okc. Francujo; Ĉefjuĝanto: S-ro S. Meyer, La Rochelle (29, quai Valin): Helpantoj: S-ro A. Brossard, S-ro A. Besnard.

Regiono: Saksujo; Ĉefjuĝanto: S-ro Steier, Leipzig (Thomasring, 6).

Regiono: Berlino; Ĉefjuĝantoj: S-ro J. Borel, Berlino (Lindenstrasse, 18-19).

Regiono: Saksa Prusujo: Ĉefjuĝanto: S-ro F. Rockmann, Magdeburg (14, Buckauerstrasse); Helpantoj: S-ro O. Graeger; S-ro E. Stark.

Regiono: Bavarujo; Ĉefjuĝanto: S-ro W. Beideck, Augsburg (31, Reissingerstrasse).

Regiono: Svisujo; Ĉefjuĝanto: S-ro Ed. Bouvier, Genève (19, Pont-d'Arve); Helpantoj: D-ro I. Ostrovski, S-ino M. Milsom.

Regiono: Svedujo; Ĉefjuĝanto: S-ro Nylen, Stockholm (Brahegatan, 60); Helpantoj: S-ro A. Larsson.

Regiono: Londono; Ĉefjuĝanto: S-ro Blaise, London (54, Solon New Road Clapham S. W.

Regiono: Bulgarujo; Ĉefjuĝanto: S-ro A. Atanasof, Sofia (ul Boteva, 33); Helpantoj; S-ro P. Jordanev, S-ro F. Kaneff.

Regiono: Italujo; Ĉefjuĝanto: S-ro A. Tellini, Bologna (Vallescura, 11); Helpantoj: S-ro Cl. Bicknell, P-ro J. Bianchini, P-ro G. Meazzini.

Regiono: Suda Hispanujo; Ĉefjuĝanto: S-ro Linarès, Cordoba (Huerto San Bazilio); Helpantoj: S-ro M. Pér. Alcorta, F-ino L. de Tapia.

---

(1) (A.) = Ano de l'Esperantista Akademio.

(2) (L. K.) = Ano de la Lingva Komitato.

REKLAMO

TARIFO

Unu paĝo	₷ 240	*1/8 kolono*	₷ 5
Unu kolono	40	*1/16 —*	2.50
1/2 —	20	*1/24 —*	1.75
1/4 —	10		

Rabato da 10 % por 3 reklamoj, 25 % por 12 reklamoj; 50 % por 24 reklamoj. Nenia alia rabato aŭ prezo konsentata.

Sin turni al la *Administrejo*, 10, rue de la Bourse, *Genève* (Svisujo) aŭ al la *ĝeneralaj agentoj*: G. Warnier, 15, rue Montmartre, *Paris*; Presejo de Esperanto, 15, rue Amiral Roussin, *Dijon* (Francujo); C. kaj G. Browne, Wellington St., Strand, *London* (Anglujo); Germana Esperanto-Librejo, Rathausstr, *Leipzig* (Germanujo); Traduka Oficejo, 6 Schleinitztr, *Bromberg* (Germanujo); Librejo Saharof, Tverskaja 29, *Moskvo* (Rusujo).

DETRANĈU KAJ SENDU PLEJ RAPIDE AL
ESPERANTIO, 10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo)

1ª KONGRESO DE U. E. A.

AUGSBURG — *28 Julio - 3 Aŭgusto*

ALIĜILO

La subskribinto mendas (1). Sm

.... Karto(j)n de Kongresano	(3 Sm).		
.... Karto(j)n de Helpkongresano	(1 Sm).		
.... Kuponaro(j)n de Iª Klaso (2)	(23 Sm).		
.... Kuponaro(j)n de IIª Klaso (2)	(20 Sm).		
.... Kuponaro(j)n de IIIª Klaso (2)	(18 Sm).		
.... Oficialan Jarlibron de U. E. A.	(0.30 Sm).		
.... Kolekton de gvidfolioj	(0.25 Sm).		
.... Oficiala(jn) insigno(j)n	(0.36 Sm).		
.... Esperantiajn Markojn			
.... Karto(j)n de Kongresano de TEKA	(1 Sm).		
Kaj kunsendas per poŝtmandato (1)........			
Ĉeko (1) — Bankbileto (1) — la sumon da....			

Nomo (tre legeble): ....

Antaŭnomo: ....

Adreso: ....

Urbo: ....

---

(1) Surstreku tion, kio ne taŭgas.

(2) La kuponaro enhavas: loĝadon dum 6 noktoj kun frua matenmanĝo, partoprenon ĉe la malferma kaj festenoj, komunajn tag- kaj vespermanĝojn dum la tuta kongreso, ekskurson al la reĝaj kasteloj de Neuschwanstein (kun vojaĝo, vizito de la kasteloj kaj komuna manĝo).

ESPERANTO *estas la plej bona internacia reklamilo por ĉiuj komercistoj, industriistoj financistoj, aferistoj,*

Ĉar ĝi estas la plej legata el ĉiuj Esperantaj gazetoj,

Ĉar ĝi havas legantojn en 44 landoj de l'terglobo,

Ĉar ĝi estas la oficiala organo de U. E. A. kaj estas uzata de ĉiuj Delegitoj, Konsuloj, Esperanto-Oficejoj.

Ĉar ĝi estas gazeto, kiun oni zorge konservas, kies ĉiun numeron legas ne unu persono, sed multaj, ĉe la kursoj, grupoj, k. a.

AVIZO. — La Administrejo serĉas en ĉiuj lokoj bonajn reklamo-makleristojn. Oni sin turnu al ĝi pri la kondiĉoj kaj pluaj informoj.

ANONCETOJ

TARIFO

Korespondado. — *Unu enskribiĝo ₷ 0.30 (fr. 0.75).*

PI = *poŝtkartoj illustritaj*; L = *leteroj*; PM = *poŝtmarkoj.*

Petoj & Proponoj; Komercaj reklamoj. — *Unu linio 40 literoj : ₷ 0.15 (fr. 0.40).*

Por ĉiuj anoncetoj, rabato da 10 % por 3 enpresoj, 25 % por 12 enpresoj, 50 % por 24 enpresoj.

Niaj abonantoj rajtas unu enskribiĝon por korespondado aŭ dulinian anonceton senpage.

NOTO. — Ĉia anonceto estos sendata, antaŭ la 5ª kaj 20ª de ĉiu monato, al nia Administrejo, al la lokaj Agentoj aŭ Esperanto-Oficejoj. Pago per poŝtmandato aŭ internaciaj poŝtkuponoj.

Korespondado

Olomonc (Moravio, Aŭstrio). — S-ro F.-R. Krontil, PK., PI.

Alcala de Henares (Hisp.). — S-ro E. Cano, Mayor 3, pri (memorigarto).

Zaragoza (Hisp.) — S-ro Rafael Benitez, Bilbao 7, PI.

Cerizy-la-Salle (Francujo, Manche). — S-ro Delahaye, instruisto. PI. — L.

Stacio Lozovaja gub. Ekat. (Rusujo). — S-ro Vlad. Jakwler. PK.

Turku (Finulando). — S-ro Leo Jalava, Arseninkatu, 176. PI. L. PK.

Dresden (Germanujo). — Fr-ino M. P. Gross, Krenkelstr., 16, 14 pt. PI.

Varonoj (Rusujo). — S-ro V. Fiŝer, 1 vira gimnazio, PK. PM. L.

Gerona (Hispanujo). — S-ro Henriko Dalman. Mercades, 32, PI.

Valencia (Hispanujo). — S-ro Ventura, studento, Boteros 10-12. PI.

Melitopol (Rusujo). — S-ro A.-V. Lenkenvich, PI. *Fotografaĵo.*

Funchal (Madejra). — S-ro Antonio Dagliardi [illegible] Graĉa, largo do Collegio-8, PI.

Tiurey (Saône-et-Loire, Francujo). — F-ino Châtelet. PI. L. (kun nefrancoj).

Nowy Bydzov (Bohemujo, Aŭstrio). — Membroj de Esperantista Klubo. PI. (marko sur bildflanko). L. Sekr. V. Arnstein, ledofabriko.

Saint-Chamond (Franc.). — S-ro Farlay, prez. de la Esp.-Grupo speciale kun getrikistoj. PI. L.

Chateau-Renault (I.-et-L., Franc.). — S-ro Maurice Cottereau, 38, rue de la République, PM. PI.

Villiers-sur-Marne (S.-et-O., Franc.). — S-ro M. Mousse, 76, rue de Paris.

Paris (Franc.). — S-ro Robert Larousse, 28, rue Vignon, PI., afrank. sur la bildflanko montrantaj la plej interesajn vidaĵojn de sia lando.

Paris (Franc.). — S-ro J. Testard, 8, rue d'Odessa. PI. Afrank. sur la vidaĵfl. Tuj respondas.

Dijon (Francujo). — S-ro H. Niessen, suboficiro, 28, strato Buffon. PI.

Esperantianoj!

Ĉiam memoru ke, kiam vi petas servon de Delegito de U. E. A. vi devas skribi sur internacia respondpoŝtkarto aŭ sendi markon aŭ kuponon por la respondo.

Esperanto-Movado

Amerika Esperantisto (N. 7, aprilo, 1910). En ĝi ni legas kelkajn interesajn informojn pri la kongreso:

« Speciala komitato por helpi pri la kongreso kaj speciale pri garantiaĵo de la elspezoj estas elektita el la Washington'a ĉambro de komerco ».

2) « Du premioj estas jam donitaj al la komitato pri la konkurso literatura. La unua estas por la plej bona verkaĵo pri la utileco de Esperanto por blinduloj. La premio estas « Braille » libroj specialaj por blinduloj. Oni petis ke la juĝanto estu Pro. Cart el Paris ».

La dua premio estas donata por verkaĵo pri la temo. « La simileco inter Zamenhof kaj Lincoln ». La premio estas la verkoj de Zamenhof speciale binditaj ». Pri la loka movado en la kongresurbo oni skribas: « la loka propagando progresas tre bone. Multaj kursoj estas kondukitaj en kaj ĉirkaŭ la urbo, kaj la vesperaj klasoj en la publika altlernejo daŭras kun ĉiusemajna aldono da lernantoj. Tiuj ĉi klasoj estas kondukataj de S-ro Reed, Dr. Ivy Kellerman, S-ro W. H. Redfield kaj S-ro F. A. Preston ».

Paroladoj estis faritaj en: Springfield, (Ohio) de S-ro Randall; Manchester (N. H.) de S-ro Baker; Erie (Penna kaj Harrisburg) (Penna) de S-ro Baker.

Grupoj estis fonditaj en: Tankawa, Ŝtato Maine. Arleta kaj Pittsburgh.

En Norda Karolino forta ŝtata asocio fondiĝis.

The-British-Esperantist (N. 64, aprilo, 1910). Sub la titolo « Floréat Esperantismus » ni legas:

Vere la vivo internacia fariĝas viglega! Pli kaj pli multiĝas la diversaj manifestacioj: okazas kongreso de la Katolikoj en Parizo, dua kongreso de Belgaj Esperantistoj en Bruĝo, dua kongreso de Bohemaj Esperantistoj en Plzen, la Franca Federacio de Junaj Esperantistoj kongresis dum Pasko en Parizo, en Junio la grupoj de Nordfrancujo kunvenos federacie en Amiens, la Britoj aranĝas kongreson en Cheltenham dum Pentekosto, la U. E. A. kaj la T. E. K. A. preparas grandan agadan kunsidaron en Augsburg, la Sesa logas trans la Atlantikon en Washington.

Al ĉiu el tiuj solenoj la organizantoj kun egale varma sincereco invitas la Esperantistaron diverslandan, ĝis fine la internaciema samideano vere sentas iom da embaraso, kiun elekti... t. e. en la okazo malofta, ke li havas sufiĉe da monrimedoj por partopreni kiun ajn! Milionuloj mankas en Esperantolando!

Sed — serioze! malgraŭ la neebleco de komuna akcepte de tiu komuna invitaro, tiu oftiĝo kaj vigliĝo de la Esperantistaj manifestacioj estas tre fidinda kaj kuraĝiga signo de la forta kreskado de nia afero.

Kaj dum la Esperantistoj tiel interklopodas, laboras samtempe la ankoraŭ ne-Esperantistoj, preparante bonan teron por la semado de Esperanto. Tiel ĉiuflanke oni aŭdas pri internaciaj kongresoj de gravaj profesioj pri gravaj temoj. Jen ni havas internacian kunvenon de Kuracistoj, de Sciencistoj; jen oni anoncas rondvojaĝon internacian de laboristoj, de urbestraroj, de ĵurnalistoj, jen proksiman jaron ni havos tre gravan kongreson en Londono pri la interrilatado de la diversaj Rasoj de l' Mondo. Pli bonajn " objektlecionojn " pri la necesegeco de Esperanto, ol tiu kongresoj, kie la diverslingveco ĉiumomente ĝenaĉas la facilecon de l' reciproka komunikado, oni ne povus trovi! Tion la Esperantistaro bone komprenas kaj provas utiligi, partoprenante laŭeble en ĉiuj kongresoj kaj pledante por sia lingvo. »

Paroladoj esti faritaj en: Croydon de S-ro Bredall; Newcastle-on-Tyne, de S-ro Pastro W. J. Wingate; Dublino, de Pastro Parker; Aden, de S-ro Pollen.

Grupo estis fondita en Aberfeldy.

Kursoj estis malfermitaj en: Darlington, Stockport, Dublino (2).

Germana Esperanto-Gazeto (N. 7, aprilo, 1910).

Paroladoj estis faritaj de S-ro Linge en Delitzsch, Halle, Weissenfeld, Leitz.

Kursoj estis fonditaj en: Delitzsch, Halle, Weissenfeld, Leitz.

Unua Kunveno de la Italaj Esp.-istoj. (Firenco, 21-23an de marto).

Gin ĉeestis reprezentantoj de ĉiuj Italaj grupoj, del. de la komerca ĉambro de Firenco kaj kelkaj fremduloj. Dum la malferma kunveno, kiel kutime okazis diversaj salutaj paroladoj. Dum la labora kunveno oni elektis S-ron Bicknell, kiel Prezidanto de la kunveno. Oni fondis federacion de la italaj esp.-istoj. Ĝia sidejo estas en Firenco. Oni aprobis la regularon, kaj elektis estraron, kiu konsistas el jenaj personoj; F-ino Ruth Hall; S-roj Bagnulo, Del Re, Giuletti, La Colla, Meazzini, Deputato Morgari, Inĝ. Niccolini, Signorini, Stromboli, Tellini kaj Viterbo.

La ĉefaj decidoj de la kunveno estas: 1) inviti la esp.-aron aranĝi dum 1913 la kongreso en Italujo, 2) Aliĝo de la Itala Federacio al U. E. A., kiel Esp. As. tio estas, ke ĉiuj membroj de grupoj italaj aliĝintaj al la Itala Federacio, devas esti samtempe membroj de U. E. A. (imitinda ekzemplo!).

3) Komisii la Palerman Grupon interkonsenti kun *Esperanto* pri eldono de speciala itala aldono al ĝi.

4) Kelkaj ĝeneralaj decidoj pri la propagando en Italujo (instigo de la societoj celantaj la *defendon* de la naciaj lingvoj helpi la disvastiĝon de Esperanto; kreo de Internacia Instituto de komercaj interŝanĝoj). Dum la solena festeno, ĝin ĉeestis 50 gesinjoroj: S-ro Deputato Morgari paroladis pri Esperanto. Pro manko da loko ni, bedaŭrinde, ne povas ĝin enpresi. Dum tiu kunveno oni ludis la Himnon de la Esperantianoj, verkita de S-ro Scarselli, del. de U. E. A. en Firenco. La proksima kunveno de la itala Federacio, okazos dum printempo 1911 en Ĝenova.

Belga Esperantisto (N. 6, aprilo, 1910).

Antverpeno. La Antverpeno Urbestraro denove subvenciis la tieajn samideanojn per 100 fr. Grupo fondiĝis en Gento.

La Holanda Pioniro (N. 7, aprilo, 1910).

Paroladoj estis faritaj en: Heinkeszand de S-ro Van Andel; Tiel, S-ro Lutkie.

Grupoj estis fonditaj en: Alkmaro, Heinkeszand, Breda, Craninco kaj Harlemo.

Lumo (N. 6-7, februaro-marto, 1910).

Kursoj estis fonditaj en: Dubnica, Haskovo, Gorna-Orehovica, Rusĉuk, Ŝumen, Pleven.

Paroladoj estis faritaj en: Harmanlii, S-ro Kirilov; Haskovo S-ro Georgev.

Grupo estis fondita en Kovaĉevec-Popovo.

Aperis nova ĵurnalo *Serba Esperantisto*, oficiala organo de la Serba Esp. Soc. Direktoro Inĝ. D. M. Andonovic, Pop. Lukina, 4, Belgrad-Serbio.

Dana Esperantisto (marto, 1910, N. 3).

La Centra Dana Esp. Ligo anoncas, ke ĝi fiksis Esperanto-Kongreson je la fino de Aŭgusto. Ni ne scias, ĉu eĉ la gravaj okazontaĵoj, pri kiuj ni parolas poste praviĝas nacian Ligon fiksi Esp. Kongreson, malgraŭ tio, ke alia Internacia Kongreso, oficiale akceptita de la tuta esp.-aro okazas aliloke. Estus certe multe pli oportune, ke la Dana Ligo aranĝu propran Danan Kongreson kaj invitu pro la samaj, certe gravaj kaŭzoj, eksterlandajn samideanojn veni multnombre; ĝi tiam evitus eblajn riproĉojn. La kaŭzo, montrita en la alvoko de la Centra Dana Ligo estas, ke dum tiu tempo okazos en la sama urbo la Internacia Socialista Kongreso, sur kies tagordo estas montrita la punkto: Enkonduko de Internacia lingvo. Ĉiuj scias, kiu grava organigazo estas tiu de la socialistoj, kiu nun kalkulas plurajn milionojn en la tuta mondo. Certe la celo estas tre nobla, efiki sur tiu organigazo, por ke ĝi alprenu nian lingvon! La provizora programo de la Dana Esp. Kongreso estas vere tre alloga kaj ni ankaŭ alvokas la samideanojn veni al la Dana Kongreso! La kosto de la kongreskarto estas Sm. 3 1/2. Oni sin turnu al S-ro J. Toft, Thorvaldsensvej 6^{III}, kopenhago.

La Simbolo (marto, 1910, N. 1; Adreso: Symbol Publishing Co, P. O. Box, 1020, Tacoma, Washington, U. S. A.). Aperas ĉiumonate, tre regule. Ni volas atentigi nian legantaron pri tiu, bele eldonata revuo kun ĉiam interesa enhavo. Ĝi komencas nun sian duan jaron. Niajn bondezirojn al la redaktantoj.

La Barakalda urbestraro subvenciis la lokan grupon per ĉirkaŭ 45 Sm.

La Sano Hispana (aprilo 1910).

La Organiza Komitato de la IIIª Brazila Kongreso de Esp. informas nin, ke la kongreso okazas la 13an de Majo. Oni promesas sukceson. Ni forgesis diri, ke la kongreso okazas en Petropolis.

Samideano Ĉiumonata (januaro 1910, N. 1ª), reaperis tipografiita kun interesa aldono de la verko « Monna Vanna » de Materlink, tradukado de A. Behrent ».

Ĥina Esperanta Revueto (Januaro 1910). Adreso: S-ro Hoa, 42, rue de Montrouge, Gentilly (Seine), Paris. Dumonata organo por propagandi Esp. inter Ĥinoj. Ni deziras sukceson al la pioniroj de nia movado en Ĥinujo.

Kaŭkaza Esperantisto (marto, 1910, N. 1ª), duonmonata literatura kaj propaganda gazeto. Adreso: Tiflis, Paŝaĵo de Puŝ'kin. Ajk Ter-Astvacatriane.

La Propaganda Klubo Esperantista en Buenos-Aires, Argentina. Adreso: Casilla de Correo, 737) petas ĉiujn samideanojn sendi al ĝi esp.-aĵojn por la aranĝota tie ekspozicio, okaze de grava nacia festo (100-jara jubileo de la sendependiĝo de Argentino). Ĉar tie okazos konkurso, estas speciale dezirinde, ke oni sendu ekspozotaĵojn, kiel eble plej multe. La ekspozicio okazos je la 25ª de majo.

Dum Pentekosto okazos en Wien *Unua Tutaŭstria Internacia Esperanto-Tago.* Ĉiuj gesamideanoj estas kore invitataj ĉeesti tiun feston.

BIBLIOGRAFIO

Duobla Librotenado. — Mondsistemo. De Ernst Wucher. Gera. -R. Germanujo. Prezo Sm. 1.25.

Jarlibro de la S. f. p. E. 1910. Eldonejo, 33, rue Lacépède. Paris. Francujo.

Praktika Frazaro, laŭ A. Matthias. Kunmetis J. Borel. Esperanto Verlag Mœller et Borel. Berlin. Germanujo. Prezo: Sm. 0.40.

Esperanto en 10 lecionoj de Th. Cart kaj M. Pagnier. IIª eldono. Tradukita bulgare de J. Kanef. Korektita kaj eldonita kun la kunlaborado de G. Atanasoff kaj G. Oreŝkoff, Sofio, Bulgarujo. Prezo: Sm. 0.40.

Hundo kaj Kato Armena legendo de Hov, Tumanjan. Esp.-igis V. Sirunjan. Presejo « Progreso », Tiflis.

Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-franca de Rektoro Boirac, entenanta la literojn L kaj sekvantajn ĝis Z. — Oni povas de nun mendi ĝin de la presejo Darantiere, Dijon, Côte-d'Or, Francujo, kaj de ĉiu esperantista librovendejo en ĉiu lando. Prezo de la *Dua Vortaro*: 4 fr. 50 (afrankite). Prezo de la *Plena Vortaro* (Iª kaj IIª partoj): 9 fr. (afrankite). Ĉiu aĉetinto de la *Plena Vortaro* havas la rajton ricevi *senpage* apartan foliaron, tre baldaŭ aperontan, en kiu troviĝos, kune kun listo de *Korektoj* (preseraroj), ne sufiĉe ĝustaj aŭ precizaj difinoj), k. t. p.), *Aldono* havanta ĉiujn novajn vortradikojn ĉerpitajn el la plej freŝdataj *Vortaroj*, eĉ aperintaj dum la presado de la *Plena Vortaro*, nome *Esperanto-Rusa* de D-ro Zamenhof, Esperanto-franca de Robert, Polo-Esperanta de Grabovski, Italo-Esperanto de Meazzini, k. t. p.

Analitika Geometrio Absoluta, unua volumo. La Ebeno Bolyai-A, de S-ro Prof. Cyrillo Vœrœs. Budapest (Hungarujo). Eldonejo de Ludoviko Kokai (Budapest, IV, Karoly-utca, 1). Prezo: 4 Sm.

Esperantista Dokumentaro. Kvina Universala Kongreso de Esperanto, Paris. Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy. Prezo: 80 Sd.

S. S.

La plej gravaj libroj kaj ĉiuj jurnaloj estas mendeblaj ĉe

Universala Esperantia Librejo

10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo).

Petoj kaj Proponoj

KONTINENTAJ PRODUKTOJ. — Firmo havanta urbcentran kontoron kaj vojaĝiston vizitantan eksportistojn kaj fabrikistojn volas reprezenti fremdajn firmojn A. Beverley and Co, Manchester.

ŜPARMONO 4%. — Eldonejo « Esperanto ». Leipzig, Langestrasse, 27, Germanujo.

SVEDO, 22-jara, arinta ekzamenon pri « matureco » kaj pri « komerca kapableco », skribe posedanta la esperantan, germanan, francan, anglan kaj iom scianta la hispanan kaj rusan lingvojn, serĉas oficon kiel komerca korespondisto plej volonte en la maŝina aŭ metala branĉo en kia ajn lando de supre diritaj lingvoj.
Sin turni al Adolf Larson, Mosebacketorg 14, Stockholm, Svedujo.

PENSIONO. — Familio de geprofesoroj ĉe la superaj lernejoj akceptus kelkajn fraŭlinojn en pensiono. Vivo agrabla kaj gaja. Centra hejtado. Ĉarma artista hejmo kun mirinda situacio kaj bonega aero, borde de l'fama Geneva lago (*France*, Esperante, germane, angle). Adr. : Sro Vittel, prof. « La Vegnetta ». *Morges par Lausanne* (Svisujo). *Esperanta prospekto* laŭ peto.

INDUSTRIA AGENTO posedanta seriozan klientaron, vizitanta orienton, centron kaj sudon de Francujo, proponas sian kunlaboradon al fremdaj firmoj por riprezenti ilin en Francujo.

Proponas ankaŭ deponejon por industriaĵoj aŭ komercaĵoj. Skribi al S-ro Macary, 27 strato Bonnand, Lyon, Francujo.

KAŬĈUKO. — Samideano vojaĝanta tra la regiono kaŭĉuka de Brazillando, sin proponas por aĉeto pogranda de kaŭĉuko kaj mangabo. Skribi por ricevi detalojn al S-ro Paulo Berthelot, Leopoldina, Goyaz, Brazilujo.

PENSIONO. — Ĝenevo (Svisujo), Villa les Mélèzes, 17, chemin des Chênes. Pensiono por fraŭlinoj, saniga situacio, ellernado de franca lingvo kaj kompletigo de la edukado. Hejma vivado. Prospekto Esperanta ĉe la direktorino. Por pluaj detaloj sin turni al la direktorino.

POR JUNULOJ. — F. L. G. Maréchal, B.-A. Direktoro (Lingva fako), Northern institute, internacia komerca lernejo, prezidanto de Internacia Asocio de Instruistoj, 384, Kingston Terrace, Leds, Anglujo, akceptas fremdajn junulojn kiuj deziras ellerni la Angl. Lingvon kaj komercajn metodojn. Banejo ; biliardĉambro, fumĉambro, k. t. p. Jare 500 Sm.

OFICO. — Junulo 20 jara ŝercas ian ajn oficon. Por informoj sin turni al Societo Radio, Ĥaskovo, Bulgarujo.

LUEBLA belega ĉambro dum la daŭro de internacia flugkonkurso. Esperanto parolata. Adreso : Gera Nyulaszij, Budapeŝt VII, teleputea 30.

KONTRAŬ RESPONDKUPONO. Fino J. Ŝupichova, instruistino sendas boheman nacian himnon Esperante tradukitan Červeny Kostelec (Bohemujo, Aŭstrio).

KOMERCISTOJ. — La Ĝenova Esp. Unuigo Via Cairoli, 39, rosso Genova (Italujo) volonte disdonas katalogojn, reklamilojn, k. t. p.

KORESPONDADO. — La Firenzaj urbaj geinstruistoj deziras interŝanĝi. Pl. Skribu al Esperanto normala Lernejo, via di neri, 1, Firenze, Italujo.

GESAMLINGVANOJ ! — Akceptu min por somerveturo Francujon ! Geesperantistoj de Côte-d'Or kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj ! Sendu viajn adresojn por ke mi povu vin viziti ! Sro A. Kovalev, Rostor a/Don (Rusujo), Puŝkinskaja, 194.

DELEGITOJ. — Prezarojn petas Rotterdamsche gereedscharhandel, Nieuwe Markt, 11, Rotterdam, Nederlando. Societo por la vendado de iloj kaj maŝinoj por buĉistoj.

OFICO. — Sro W. de Lerber (Grancy, 29, Lausanne (Svisujo), dez. trovi oficon de pagita guberniestro, kie ajn. Li parolas france, Esp., germane, angle ; konas klasikajn lingvojn.

Komercaj reklamoj

GRANDA HOTELO DU GLOBE, Paris, 71, rue Monge (apud rue Lacépède). Posedanto A. Leclerc. Proksime stacidomoj Austerlitz-Lyon-Montparnasse kaj Sportoĝardeno Sorbonne-Luxembourg'a ĝardeno. Ĉambroj de 0,80 Sm. Sm. 2. La gemastroj estas esperantistoj.

CENT DIVERSAJ POŜTKARTOJ Esperantaj por elekti. Mendu prezaron de Eldonejo Germanujo ; Leipzig, Langestr. 27.

9 LAMPIONOJ, formante la vorton Esperanto, Sm. 1.50 kaj sendelspezoj. Eldonejo *Esperanto*, Germanujo, Leipzig, Langstr., 27.

150 ESPER. POŜTKARTOJ diversaj Sm. 4.50 (100, 3 Sm.). Mendu prezaron. Eldonejo *Esperanto*, Germanujo, Leipzig, Langestr., 27.

INTERNACIA PROPAGANDA KORESPOND-POŜTKARTO, seslingve kun belega bildo de nia majstro. Po 10 ekz. Sm. 0.45 ; po 50 ekz. Sm. 0.55 ; po 100 ekz. Sm. 0.90 ; 1000 ekz. Sm. 5.20, afrankite. Oni akceptas ankaŭ poŝtmarkojn ĉiunaciajn, transpagilojn kaj Esp-ĉekojn. *Germana Esperanto-Librejo*, Kœnigstr. 19, Leipzig, Germanujo.

La Administranto (Gérant) : DUVAL

Laborista Kooperativa Presejo,
15, rue Amiral-Roussin. Dijon
(Francujo)

WÖRISHOFEN

Akvo kaj Montaerokuracoj

(Metodo Kneipp)

Aero-, suno kaj elektraj banoj. Somero kaj vintrosezono ; 629 m. s. l. m. KLIMATO SUBALPA. Loĝejo kaj flegado je ĉiuj bezonoj, en sanatorio, institutoj, hoteloj, pensionoj kaj vilaoj. 2 horoj de München-Augsburg. Nombro de fremduloj en 1909 : 9314 personoj. Prospektoj kaj informoj per la KURVEREIN.

Delegitoj de U. E. A.

La Esperantia Entrepreno *Centra Komercejo por Esperantujo Johannes Heyn, Leipzig* (Germanujo), *Thomasring 6*, serĉas ĉiuloke seriozajn reprezentantojn por siaj *komercaĵoj* kaj por la tutmonda *revuo*, alterne ilustrata *La Duonmonata*, kiu akiras ĉiam pli da simpatio kaj abonantoj. Prezidantoj, sekretarioj kaj kursestroj de Esperantistaj grupoj tuj postulu la ilustritan katalogon kun la kondiĉoj reprezentistaj kaj specimenon de *La Duonmonata*, ĉar Vi facile povos gajni

Multe da Mono

Ĉampano por Samideanoj

FRANCA VINO

Speciala Marko por Esperantistoj

Verda Etiketo, Blanka Etiketo

L. HURINOWICZ

en **WASSY** (Hte-Marne) Franclando

Agentoj kun bonegaj referencoj estas dezirataj en ĉiuj landoj.

Bifolle
Helder

SANECO estas *trezoro*, kiun oni konservas facile, kiam oni havas bonan stomakon. Skribu : 6, rue du Helder, *Paris*.

Bad Reichenhall

La perlo de la germanaj alpoj, *mondfama salakvo-banloko, klimata kuracloko.* Plej grandaj pneŭmataj ĉambroj kaj inhalacejoj de la mondo. Jara vizitado : pli ol 35.000 personoj. Sezono : Majo-Oktobro. Kuracado de *malsanoj de la spirorganoj*, astmo, emfisemo, *kormalsanoj, virinsekso*, skrofolo, raĥito artrito, reŭmatismo, *resaniĝado. Riĉenhava amuzprogramo.* 250 kilometroj zorge bonstataj promenadvojoj en la tutan ĉarmegan ĉirkaŭaĵon. Gvidfoliojn oni bonvolu postuli de la Esperantista Grupo Bad Reichenhall.

Por la Higieno de l'tualeto

(lavaĵoj, higieno de 'buŝo, la haŭto, lavado de suĉinfanoj, intima higieno)

Oni nepre rekomendas

COALTAR SAPONINE LEBEUF

BAYONNE (Francujo)

Kiun ĝiaj antisepcaj, deterŝivaj kaj cikatrigaj propraĵoj akceptigis ĉe la Parizaj Hospitaloj.

En la apotekejoj — Atentu la imitaĵojn

AL LA KOLEKTISTOJ

Post kelkaj jaroj, *grandan valoron* havos la plena kolekto de la gazeto.

ESPERANTO

Do, rapidu mendi ĉi tiun plenan kolekton dum ĝi estas ankoraŭ havebla po malkara prezo.

La tuta Kolekto (75 no j), afrankite 4 $.

Sin turni al la Administrejo (10, rue de la Bourse, Genève).

Malnovaj n-oj antaŭ 1 Decembro 1908 ne estas izole aĉeteblaj.

Granda Marko

" Ville de Paris "

INKOJ MIETTE

gluoj likvidaj, sigeloj

Jules MIETTE

102, Rue Amelot, PARIS-XI

PROPAGANDAJ FOTOGRAFAĴOJ

Ĉiuj Esperantistoj devas tuj mendi la novan eldonon de la poŝtkartoj kaj fotografaĵoj de la Esper. Gazetaro, eldonitan de la Esperantista Gruparo Berlina.

100 poŝtkartoj kostas . . . . 1.70 Sm.
10 fotografaĵoj (40 sur 30 cm) 3.75 —

Sin turni al S-ro SOSTMANN, Berlin, Nw. 87, Levetrowstr. 23.

Oni havas multajn rusajn kaj alilandajn medalojn por birdoj.

RASA & INDUSTRIA

BIRDEDUKEJO

DE

Aleksandr SĈERBAKOV

St. PUŜKINO, Sever, j. d., Rusujo

Havigas diversajn rasojn de Anseroj, Anasoj, Kokinoj kaj Kokoj, k. t. p.

Apartan prezaron por ovoj oni sendas laŭ la postulo.

Oni korespondas esperante.

HOTELO

LOUIS-LE-GRAND

2, rue Louis-Le-Grand, Paris.

En belega loko, inter la Rue de la Paix kaj Avenue de l'Opéra. Moderaj Prezoj. Oni parolas en Esperanto. English Spoken. Man spricht Deutsch. Se habla Espanol.

La sola internacia signo estas :

la VERDA STELO " GASSE "

(8a jaro).

kun ore skribita vorto " ESPERANTO " (déposée-registrita).

REKONIGILO ! PROPAGANDILO !

Pingloj, broĉoj, kravataj pingletoj : 1 : Fr. **0 75.** 10 : Fr. **6.** — 100 : Fr. **45.** — afr. kaj rekom.

Ĉensignoj (kun duoblo faco) 1 : Fr. : **1 50,** 10 : Fr. **12.** — Afr. kaj rekon.

Konto kun Ĉekbanko.

Mendu ilin al via grupo, aŭ per simpla poŝtkarta mandato al Sinjoro Emilo Gasse, 55, rue Fred. Bellanger, Havro, Francujo, aŭ al subtenejoj : Belgujo : S-ro. O. Van Schoor, Vondelstr. Antverpeno. Britujo : Esp. Oficejo Liverpool. Germanujo : Moller et Borel, Berlin. Hispanujo : Manuel Fuentès Bidebarrieta, Bilbao. Rusujo : Moskva librejo Esperanto, Tverskaja 28. Moskvo.

STENOGRAFIA GAZETO ESPERANTA

(instruaj folioj de sistemo Aoro)

enhavas metodan lernolibron de internacia stenografio aoro kaj multon da artikoloj skribitaj per tiu sistemo.

Jara abono 30 Sd. (3 int. respondkuponoj

Por abonintoj de **STUDENTO** (1 Sm.) senpage !

Oni mendu (aldonu 3 int. respond. kuponoj) ĉe administracio de **STUDENTO**. Praha II-516, Bohemujo. Rabato al grupoj !

PARIS EGLI'S HOTELO INTERNACIA

11, rue Bachaumont (Bourse)

Moderna, centre de Paris, proksime Louvre kaj Bulvardoj. 90 ĉambroj. Tre moderaj prezoj.

Svisa mastro.

Oni parolas Esperante.

3.000 membroj
EN
FREMDAJ LANDOJ

Jara Kotizaĵo
2 dolaroj (4 $)

Membroj havas la jenajn profitojn :
Ricevi informojn el ĉiuj landoj
Konatiĝi antaŭ ol forveturi eksterlanden

CHARTERED A.-D. - 1900

Sinjorinoj
Sinjoroj
estas akceptataj por membreco
Prospektoj kontraŭ afrankpago
(senpage al la skeptikuloj)
Adresu leterojn kaj monon al
Sekretario de C. C. C.

Korespondi en fremdaj lingvoj

Interŝanĝi revuojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn

fotografaĵojon, plantaĵojn insektojn, k. t. p.

Milwauke, Wisconsin, U. S. A.

Vojo por aliĝi. — 1. Skribu vian nomon kaj adreson (legeble) kun unu aŭ pluraj referencoj. — 2. Skribu la lingvojn, kiujn vi komprenas. — 3 Konigu la temon pri kiu vi deziras korespondi. — 4. Sendu la kotizaĵon (4 $) per ĉeko aŭ poŝtmandato. Via nomo estos enskribata kaj vi ricevos ĉiujn paperojn kaj ekz. de *Globe Trotter* kun la plena listo de l'membroj.

La PLEJ MULTEKOSTA JUVELO

en la negoca vivo de l'20a centjaro, **la Tempo**, ĉie estas ŝparata minutprecize per la

" Kontrol-Tempstampilo "

Ĝi stampas per unu premo : firmon, lokon, daton, horon, minuton ! Nur unu ciferplato !

Nova !

Nenia risko, ĉar unujara *garantio !*

La horloĝradaro iras *36 horojn !*

Prezo : 13 $

kontraŭ mon-antaŭsendo.

Prospektoj senpage !

Praktika !

Ĝi devus manki en nenia moderna komercejo aŭ kontoro !

Pezo : 175 gramoj.

Prezo : 13 $

kontraŭ mon-antaŭsendo.

Prospektoj senpage !

Fritz MAYERHAUSER

Dissendejo de pratikaj novajoj

BAD REICHENHALL (Germanujo)

(Esperantia entrepreno No 43.362.∞1)

SENSACIA NOVAĴO

La 11-jara Esperantistino
Manjo
Mayerhaŭser

Alsendante vian fotografaĵon, vi ricevos, post kelkaj tagoj, en apuda grandeco

VELOFOT-PORTRETOJN,

la plej belajn, malmultekostajn, akrajn, daŭrajn fotografaĵojn, kiuj ekzistas.

PREZOJ :		
20 fotografaĵoj	$	50
50 »	»	1 »
100 »	»	1 75

Konvenaj kadretoj po 2 1/2 Sd.

La senditajn fotografaĵojn oni rericevas nedifektite !
Livero post sendo de la mono (enlande 10 Sd., eksterlande 20 Sd. plie por transsendo), aŭ per poŝta repago, aŭ per ĉekoj de la Esp. Ĉekbanko.

FRITZ MAYERHAŬSER

BAD REICHENHALL (Germanujo)

(Esperantia Entrepreno No 43,3626 ∞ 1)

Tre konvenaj por alglui sur la membrokartojn de U. E. A.

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

eliranta inter la 15. kaj la 20. de ĉiu monato

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ GAZETOJ ESPERANTISTAJ

(FONDITA EN 1895

La plej enhavoriĉa !

48 paĝoj da dense presita teksto en plej korekta kaj plej klasika stilo.

La plej malkara !

5 fr. (2 $) abonprezo por UNU JARO

BAD-REICHENHALL en la germanaj Alpoj

VILAO CONTINENTAL

Plej bela, kvieta kaj senpolva altaĵloko. Ĉirkaŭata per ombraj ĝardenoj. Belega vidaĵo al la montaro kaj urbo. 40 elegantaj meblitaj ĉambroj kun 60 litoj kaj 25 balkonoj. Banoj en ĉiu etaĝo. Elektra lumo. Bonegaj manĝaĵoj. Puraj vinoj. Granda bela manĝoĉambro.

POSEDANTO : **Schwartz.** TELEGRAMADRESO : **Continental**

ONI PAROLAS ESPERANTE

GRAVA AVIZO !...

Gesamideanoj,

Jen alvenas la Jubileo. Por ĝin festi, ĉiuj, ĉiuj, ornamu viajn fenestrojn per esperantista flago.



Pri tio petu la senpagan ilustritan prezaron de flagoj Esperantaj kaj diversnaciaj al la Firmo

Cuzon, 52, rue de Paris Charenton, (Seine), France.

Centra komercejo por Esperantujo Johannes Heyn, Leipzig, Tomasring 6

Ĉu vi jam mendis

Zamenhofan festnumeron de " La Duonmonata " ?

La lukse eldonita kajero estas tre grava dokumento historia kaj propaganda, kiu enhavas 8 bildojn de D-ro L. L. Zamenhof kaj liaj familianoj kaj grupbildon de la Unua Komitato de la Varsovia Societo Esperantista.

La plej eminentaj esperantistoj de Lingva Komitato kaj ĝia Akademio verkis artikolojn por ĝi. Krom tio ĝi enhavas biografion pri D-ro Zamenhof de la redaktisto Karl Steier kaj multajn aliajn interesaĵojn.

Prezo afrankite : 1 ekz. 15 Sd., almenaŭ 8 ekz. po 13 Sd., almenaŭ 30 ekz. po 10 Sd.

Jarabonantoj al *La Duonmonata* por 1910 (22 numeroj Sm. 1.75) ricevos la festnumeron donace !

Du Novaj insignoj Esperantistaj

Nro. 1-a originala grandeco

Nro. 1-a. *Zamenhofa reliefaĵeto*, el masiva bronzo.

Artista ornamaĵo, ne trudema propagandilo !

Nro. 2-a. *Verda stelo*, diafane emajlumita, kun radiaro kometvosta en naciaj koloroj de la portanto. Insignoj por ĉiuj nacioj. Por germanoj en koloroj nigra blanka, ruĝa.



Nro. 2-a originala grandeco

La ambaŭ insignoj estas fabrikataj laŭ broĉa aŭ kravatpingla formo kaj kostas po 1 ekz. 40 Sd., po 10 ekz. Sm. 3.60 ktp.

NOVAJ poŝtkartoj :

- *D-ro L. L. Zamenhof*, trikolora poŝtkarto laŭ originala pentraĵo de G. K. Lehmann.
- *D-ro L. L. Zamenhof*, fototipio laŭ skulptita reliefo de Fr. Brodauf.
- *D-ro L. L. Zamenhof*, laŭ kretdesegnaĵo de G. K. Lehmann.
- *Apoteoso* koloriĝita al feino Esperanto de G. K. Lehmann.

PREZO : 1 ekz. 5 Sd., po 10 diversaj ekz. 45 Sd., po 100 ekz. diversaj Sm. 4.

Valora premio : Ĉiuj mendantoj rajtas ricevi la premion de vendado, kaj al ĉiu kiu mendos sume po Sm. 4 — ni donacos ĝis revoko grandan (34×46 cmj) bildon trikoloran de nia Majstro. Tiu premiigo ne rilatas al la abonmendoj.

MEDIZINISCHE LICHT- & HERZ- u. NERVEN-

Heilanstalt-Kuracejo

por lumkuracado
por malsanoj de l'koro kaj de l'nervoj.

vormals : ROTES KREUZ — antaŭe : RUĜA KRUCO

51 Luisenstrasse **BERLIN NW. 6** *Telefono III, 3185*

Sekcio por lumkuracado

Elektra lumo kun elektrodoj de karbo, fero, hidrargo. Lumo de Roentgen. Radiado d'Arsonval kaj de Oudin kontraŭ artrito, reŭmatismo, neŭralgio, iŝialgio, furunkulozo, diabeto, k. t. p.

Radiado kaj fotografado laŭ Roentgen

Sekcio por malsanoj de l'koro kaj de l'nervoj

Esploroj per radioj de Roentgen kaj konstatado de l'agado de l'koro. Banoj kun karbacido kaj ŝprucbanoj kun pinburĝonoj. Elektraj banoj por la tuta korpo kaj por apartaj membroj. Vibromasaĝo k. t. p.

La kuracado plene anstataŭas restadon en Bad Nauheim

Prospekto laŭ deziro — **KURACADO AMBULANTE. ONI PAROLAS ESPERANTE.** — Du kuracistoj — Direktoro : **Dr. BREIGER**

Interesega apero en la esperanta literaturo !

GRAVEGA POR LA KOMERCISTARO !

DUOBLA LIBROTENADO « MONDSISTEMO »

de E. WUCHER

Prezo : **1,25** Sm. neafrankita. Havebla de Bigalke & Mohwinkel, Schlechnitzstr. 6, *Bromberg* (German.).

50 Jara sukceso!

OSIJEKA VIZAĜPOMADO KAJ OSIJEKA SALVATOR-SAPO

forigas ŝprucmakulojn, kaj ĉian malpurajon de l'vizaĝo

Malfalsa sole nur en la Salvator apoteko

J.-C. DIENEŠ, OSIJEK (Essegg) (Kroatujo)

1 vazeto da osijeka vizaĝpomado kostas po 70 heleroj kaj po 1 Krono (1 Krono = 100 h. = 42 spesdekoj) ; 1 peco da Salvator-sapo 1 K. Unu vazeto da manŝmiraĵo 1 K. 20 h. Lyona pudro, malgranda skatolo 1 K. granda skatolo 2 K. Tiuj ĉi rimedoj ne havas domaĝajn konsistaĵojn kaj tutege respondas al la regularo de la alta registaro.

KIAL ESTAS UZOTA NUR

" MIRANDA-KREMO " ?

Ĉar *Miranda*-Kremo estas perfekte nedomaĝa, ĉar per « **Miranda-Kremo** » **oni atingas idealan belecon**, ĉar *Miranda*-Kremo forigas ĉian malpuraĵon de la haŭto, ĉar *Miranda*-Kremo ne nur **plibeligas**, sed ankaŭ **junigas**. Unu vazeto da « **Miranda** » **Kremo** kostas 1 K. Unu skatolo da « **Miranda**-**pudro** » (trikolora) 1 K. unu peco da « **Miranda** » **sapo** 70 h.

Ricevebla ĉe la produktanto **J.-C. DIENEŜ**, post Osijek, supera urbo, de kie mendoj per poŝtpaĝo tuj efektiviĝas

La korespondado kun la **Salvator-Apoteko**, de **J.-C. Dienes** estas ankaŭ en la lingvo **Esperanto** krom la lingvoj germana, angla, franca, itala, latina, kroata, serba, aliaj slavaj lingvoj kaj la magyara.

La korespondanto de firmo J.-C. Dienes estas Drag. Mirko Kaniĉar, Delegito U. E. A.

Atentu firmon kaj markon !

Kiam vi volas prizorgi vian sanecon, ĉiam evitu alkoholon kaj elektu kiel tablan kaj ekfreŝigantan trinkaĵon la

Senalkoholaj Wormsaj Nektar-Vinoj

(vinber- kaj fruktmostoj)

Literaturaĵon senpage kaj afrankite per

NEKTAR WORMS a/Rh. No 248



Tiu ĉi

SVEDA RAZILO

kostas

1 po 1.92 $
2 — 3.30
3 — 4.12 afrankite

Vidu la antaŭajn anoncojn en la gazeto.

John BYHLINGER, HEDEMORA (Svedujo)

F. Emil Boden, Dresden (Saksujo)

Bismarckplaco 12

Esperantista Eldonejo :: Esperantista Librejo
Esperantista Presejo :: Artista Presejo ::

Atentu! La mendojn ni nur povas plenumi kontraŭ antaŭsendo aŭ pagoŝarĝo de la mono. Je antaŭpago ni petas aldoni 5% de la sumo por niaj sendkostoj.

Laŭmetoda, detala **Lernlibro de Esperanto**, verkita de Karl Schönherr, instruisto. **7a** eldono	M 1.75
Lexikon deutscher Redensarten, ellaborita kaj en Esperanton tradukita de rektoro Wilh. Velten kaj R. Richter. Broŝurita M 2.50, bele bindita . . .	„ 3.—
Malgranda kantareto (kun notoj)	„ 0.50
Dr. Zamenhofs Tabelle der Formwörter, verkita de rektoro Wilh. Velten	„ 0.40